

ESPERANTO

REVUO INTERNACIA

El la komenca periodo



D-ro L. L. Zamenhof kaj S-ino Klara Zamenhof-Silbernik je ekskurso dum la Dresden-a U.K. 1908

N-ro 638 (1)

Januaro 1959



Zamenhof-Jaro

**Universala
Esperanto-Asocio**

**(En Konsultaj Rilatoj kun
U.N.E.S.C.O.)**

esperanto

JANUARO 1959

52a J A R O

REVUO INTERNACIA

N-RO 638 (1)

Fondinto: H. HODLER

Geredaktoroj : s-ino Kirsten Zacho kaj s-ro H. V. Rasmussen, cand. oecon.

Ĉion por la redakcio oni sendu al la Redakcia adreso : S-ino Kirsten Zacho, Randbølvej 4, København, Danlando.

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la revuo Esperanto (abonado, reklamoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Eendrachtsweg 7, Rotterdam-C., Nederlando. Telefono : Rotterdam 128313. Ĝirkonto : 378964 Ĉiu materialo por difinita numero devas atingi respektive la redakcion aŭ la Centran Oficejon (vidu supre) antaŭ la 1-a de la antaŭa monato.

Bankisto de U.E.A. :

R. Mees & Zoonen, Blaak 10, Rotterdam-C.

Traduko kaj represo de artikoloj estas permesataj, kondiĉe ke oni citu la fonton. Oni sendu tian represajon al nia redakcio.

Jara abono (1959) : 9,50 n.gld. (kun membreco kaj jarlibro 12,50 n.gld.). Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

Tarifo por reklamoj :

1 paĝo 128,— gld $\frac{1}{2}$ paĝo 64,— gld $\frac{1}{4}$ paĝo 32,— gld $\frac{1}{8}$ paĝo 16,— gld $\frac{1}{16}$ paĝo 8,— gld

Anoncetoj pri korespondado :

0,10 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

Legantoj en 80 landoj.

Estraro de U.E.A. :

Prof. D-ro Giorgio Canuto, prezidanto, Via Chiabrera 37, Torino.

Prof. D-ro Ivo Lapenna, ĝenerala sekretario, 77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.

H. W. Holmes, O.B.E., vic-prezidanto, 38, Fillebrook Road, London E 11, Britujo.

R. Llech-Walter, estrarano pri financoj, 5 Quai Vauban, Perpignan (Pyr. Or.), Francujo.

D-ro Ing. Giordano Azzi, estrarano pri kulturaj aferoj, viale Giulio Cesare 20, Como, Italujo.

D-ro W. Herrmann, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, Bürstädterstr. 3, (16) Lampertheim-Hessen, Germanujo.

Centro de Esploro kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo, Telefono : ARNold 90-81.

Serva Centro, Palais Wilson Genève. Svislando.

Honora Administranto : Hans Jakob. Telef. 32.30.34.

Enhavo

"jam temp' está !"	1
Zamenhof-Jaro	2
D-ro L. L. Zamenhof	4
La plej granda monda Kampanjo	6
Kelkaj Sloganoj	7
U.E.A. en la 10-a konferenco de UNESKO	8
"Rasismo"	10
Belarta Konkurso	11
Kultura Kooperativo	12
Eŭropa Lingvo-Kampanjo	14
Varsovio kaj mi	15
Sukcesa ekspozicio	16
Agi ĉe internaciaj kongresoj	19
Nekrologo	19

Rubrikoj :

CED	9
La juna Vivo	10
La internaciaj konkursoj 1958	16
Radio	17
Tra la mondo	17
44-a U.K. de Esperanto	18
Oficiala Informilo	19

Manuskriptoj por "Esperanto" estu liveritaj al la redakcio en du ekzempleroj. Ili devas esti klare tajpitaj en perfekta Esperanto. Oni skribu sur nur unu flanko de la papero (prefere en normformato A4), kun interlinia spaco kaj kun larĝa margeno maldekstre. Supersignitaj literoj devas havi la ĝustajn supersignojn, se necese permane aldonitajn. Neuzotajn manuskriptojn oni resendadas nur kontraŭ afranko aŭ respondkupono.

OFICIALA ORGANO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

(EN KONSULTAJ RILATOJ KUN U.N.E.S.C.O.)

„jam temp' está!”

Kiam mi sidis ĉe l' skribotablo por surpaperigi kelkajn salutvortojn al niaj legantoj por la komenco de la nova jaro 1959, la jaro de la 100-a datreveno de la naskiĝo de D-ro L. L. Zamenhof, mi ne scias pro kiuj subkonsciaj ideaj kunmetadoj, ekaperis en mia cerbo la vortoj de tiu himno, verkita en la praformo de la internacia lingvo, kiu estis kantita de la juna Ludoviko, kun siaj gimnaziaj kolegoj, ĉirkaŭ la kuko kuirita de la patrino, kaj el tiuj vortoj eksonis en mi, kiel voko de trumpeta signalo, la jenaj: „jam temp' está!”.

Jes, venas la nova jaro, la jaro tute speciala kaj signifoplena por ni, la Zamenhof-jaro, kaj ni ĉiuj devas ekmoviĝi je tiu alvoko, kiu sonas kiel vekalkrio: jam estas tempo!

Estas tempo por ke ni agu en ĉiuj landoj informante la publikon pri nia ekzistado kaj pri la rezultoj akiritaj dum 70 jaroj da laboro; estas tempo por ke ĉiuj samtempe streĉu siajn fortojn, tiel la asocioj kaj la grupoj, kiel la opaj esperantistoj, donante ne nur laboron kaj moralan aliĝon al la diversaj iniciatoj, sed ankaŭ materian helpon, kiel plej eble grandan, okaze de la speciala festa jaro.

Dum dekoj kaj dekoj da jaroj, malgraŭ la indiferenteco de la granda publiko, pacience laboris niaj pioniroj, laboris niaj grupoj kaj niaj asocioj, niaj kursgvidantoj kaj niaj verkistoj, kaj ni povas nun fieri pro la atingita rezulto. Niaj kongresoj estas vivanta pruvo de la ebleco de internaciaj renkontoj, sen interpretistoj kaj sen temporabaj kaj ofte erarigaj tradukoj, estas pruvo de la funkciado de nia lingvo, kiel rekta interkomprenilo inter la homoj de la tuta mondo; nia literaturo estas la dokumento pri la taŭgeco de nia lingvo por la esprimado de ĉiuj nuancoj de la penso; la radio-dissendoj, facile komprenataj en la plej malproksimaj landoj, estas la konfirmo de la klareco de la Esperanta elparolado.

Ni montris dum 70-jara vivado, ke nia lingvo kapablas evolui laŭ la neceso de la vivoŝanĝoj kaj de la scienca progreso, kaj ke tamen ĝi restis fundamente la sama, ne disfalante en dialektojn, kiel oni volis antaŭvidi flanke de la kontraŭuloj de la ideo de lingvo internacia.

Tamen tiuj faktoj, kiujn ni bone konas, kiuj estas por ni ne neigebla vero, praktike ne ekzistas por la plimulto de la homoj, kiuj ĝenerale havas ankoraŭ strangajn opiniojn pri nia lingvo. Oni pensas ĝin utopia projekto de frenezuloj, sen teknika kaj praktika kapableco, nesufiĉa ilo por esprimi, kion oni esprimas per la aliaj lingvoj.

Jen estas tempo, ke ni klopodu rompi tiun ringon, kiu nin enfermas, ke ni agu kontraŭ la granda amaso de la indiferentuloj, ke ni influu la publikan opinion per impona monda manifestacio de la Esperantismo. En la artikoloj aperintaj en la decembra numero de nia revuo de 1958, Prof. Lapenna skizis la planitajn laborojn por la festoj okaze de la Zamenhof-jaro. Nun estas farita la *Internacia Patrona Komitato*, kiun ni prezentas pli sube, kaj en kiu oni povas trovi la nomoj de gravaj eminentuloj de la plej diversaj landoj de la mondo: Statestroj, kaj Ministroj, sciencistoj, intelektuloj, estroj de la plej diversaj gravaj entreprenoj kaj asocioj, ĉiuj ne apartenantaj al nia movado, sed favoraj al ĝi. Kiel konate oni jam decidis solenan jubilean kongreson en Varsovio, la urbo kie vivis D-ro Zamenhof, kie naskiĝis Esperanto; oni jam anoncas ke Pollando eldonos specialan memorigan poŝtmarkon..... Kion ni povos fari ankaŭ en aliaj landoj? Ni estas nur je la unuaj tagoj de la jaro, nia intensa kunaga kolektiva laboro, laŭ la fiksita plano, devas komenciĝi, por ke je la monato de decembro, kiam okazos la solena tago de la datreveno, ni rikoltu bonajn rezultojn.

Ni ĉiuj streĉu niajn klopodojn al la sama celo, ni estu fidelaj al nia devizo: „Unueco estas forto”.

Giorgio Canuto

KONTRIBUU AL FONDAĴO - ZAMENHOF!



ZAMENHOF-JARO

Sub la alta aŭspicio de INTERNACIA PATRONA KOMITATO Konsistanta el gesinjoroj

D-ro Juscelino Kubitschek de Oliveira, Prezidanto de la Respubliko, Brazilo;

Vincent Auriol, antaŭa Prezidanto de la Franca Respubliko; *Enrico Celio*, antaŭa Prezidanto de la Svisa Konfederacio;

Camille Huysmans, Prezidanto de la Ĉambro de Deputitoj, Belgujo; *Czesław Wycech*, Marŝalo de la Pola Parlamento (Sejm), Gvidanto de la Unuigita Kampanara Partio, Pollando; *István Vass*, Vicprezidentino de la Parlamento, Sekretariino de la Landa Konsilantaro de la Patriota Popolfronto, Hungarujo;

Józef Cyrankiewicz, Prezidanto de Ministroj de la Pola Popola Respubliko; *D-ro W. Drees*, Honor-Ministro, antaŭa Ĉefministro de Nederlando; *Gaston Eyskens*, Ĉefministro de Belgujo; *Guy Mollet*, antaŭa Ĉefministro kaj Vicprezidanto de la Konsilantaro de Ministroj, Francujo; *Rt. Hon. Walter Nash*, Ĉefministro de Novzelando;

Birger Bergersen, Ministro de Ekleziaj Aferoj kaj Instruado, Norvegujo; *Władysław Bienkowski*, Ministro de Klerigo, Pollando; *R. G. Casey*, Ministro de Eksterlandaj Aferoj, Aŭstralio; *Krste Crvenkovski*, Membro de la Federacia Ekzekutiva Konsilantaro kaj Sekretario de la Konsilantaro por la Kulturo kaj Edukado, Jugoslavio; *W. Dahanayaka*, Ministro de Edukado, Cejlono; *R. Edenman*, Ministro de Kulturaj kaj Edukaj Aferoj, Svedlando; *Prof. Oscar Secco Ellauri*, Ministro de Eksterlandaj Aferoj, estinta Ministro de Publika Instruado, Membro de la Plenuma Komitato de U.N.E.S.C.O., Urugvajo; *Prof. Tadeusz Galinski*, Ministro de Kulturo kaj Artoj, Pollando; *Jørgen Jørgensen*, Ministro de Edukado, Danlando; *István Kossa*, Ministro de Trafiko kaj Poŝtaj Aferoj, Hungarujo; *Jayaweera Kuruppu*, Ministro de Loka Registaro kaj Kulturaj Aferoj, Cejlono; *Halvard Lange*, Ministro de Eksterlandaj Aferoj, Norvegujo; *Ernst Lemmer*, Federacia Ministro por Tutgermanaj Aferoj, Germanujo; *Kolonelo Marco Aurelio Mérida*, Ministro de Publika Edukado, Gvatemalo; *D-ro Francisco Negrão de Lima*, Ministro de Eksterlandaj Aferoj, estinta Urbestro de Rio de Janeiro, Brazilo; *Søren Olesen*, Ministro de Enlandaj Aferoj, Danlando; *Prof. D-ro Clovis Salgado*, Ministro de Edukado kaj Kulturo, Brazilo; *D-ro Inĝ. Hans-Christoph Seebohm*, Federacia Ministro por Trafiko, Germanujo; *Lic. Jesús Unda Murillo*, Ministro de Eksterlandaj Aferoj, Gvatemalo; *Prof. Stefan Żółkiewski*, Ministro de Superaj Lernejoj, Pollando;

D-ro Inĝ. Hans Frenzel, estinta Ministro, Prezidanto de la Ŝtata Kalkula Kortumo, Aŭstrujo; *D-ro José Carlos de Macedo Soares*, estinta Ministro de Justico, Internaj Aferoj kaj Eksterlandaj Aferoj, Membro de la Brazila Beletristika Akademio, Brazilo; *Prof. D-ro Maurício de Medeiros*, estinta Ministro de Sano, Membro de la Brazila Beletristika Akademio, Brazilo; *Rt. Hon. Lordo Pakenham of Cowley, P.C., M.A.*, estinta Ministro de Transportoj, Britujo;

Lordo Boyd-Orr of Brechin Mearns, estinta Ĝenerala Direktoro de F.A.O. (Organizacio por la Nutraĵo kaj Agrikulturo), Prezidanto de la Brita Paca Konsilantaro, Hon. Prezidanto de la Monda Asocio de Mondaj Federalistoj, Nobelpremiito por la Paco (1949), Britujo; *Trygve Lie*, estinta Ĝenerala Sekretario de Unuigintaj Nacioj, Guberniestro de Oslo kaj Akershus, Norvegujo;

Prof. Väino Aaltonen, skulptisto, Membro de la Akademio de Sciencoj, Finnlando; *Prof. Gustinus Ambrosi*, skulptisto, Aŭstrujo; *Rafael Arevalo Martínez*, poeto kaj verkisto, Gvatemalo; *Paulo Ariste*, lingvisto, Akademiano, Membro de la Akademio de la Estona Respubliko, U.S.S.R.; *Marius Barbeau*, D. Litt., F.R.S.C. Direktoro de la Nacia Muzeo, Kanado; *D-ro Alexandre José Barbosa Lima Sobrinho*, estinta Ŝtatestro de Pernambuco, Membro de la Brazila Beletristika Akademio, Brazilo; *Kardinalo Don Jayme de*

Barros Camãra, Ĉefepiskopo de Rio de Janeiro, Brazilo; Prof. Pierre Bovet, psikologo, Hon. Prof. de la Universitato de Genève, estinta Direktoro de la Internacia Oficejo pri Edukado, estinta Direktoro de la Instituto J. J. Rousseau pri Edukaj Sciencoj, Svislando; D-ro Anton F. Bruun, Direktoro de la Galathea-ekspedicio profundmara, Danlando; Prof. D-ro Pedro Calmon, Rektoro de la Universitato de Brazilo, Membro de la Beletristika Akademio, Brazilo; Prof. D-ro Milton Campos, Senatano, estinta Ŝtatestro de Minas Gerais, Brazilo; Ferreira de Castro, verkisto, Portugalujo; Prof. Emile Delage, Rektoro de la Akademio de Bordeaux, Francujo; Emile Delaruelle, Urbestro de la urbo Elisabethville, Kongo Belga; Zygmunt Dworakowski, Prezidanto de ĉefurbo Varsovio, Pollando; Prof. Carlos Sabat Ercasty, verkisto kaj poeto, Membro de la Urugvaja Belarta Akademio, Profesoro de Literaturo en la Fakultato de Humanismo kaj Sciencoj, Prezidanto de la Ateneo en Montevideo, Urugvajo; Prof. D-ro Clemente Estable, sciencisto biologo, histologo kaj pedagogo, Doktoro Honora de la Fakultato de Medicino kaj ties Profesoro, Direktoro de la Nacia Instituto de Biologiaj Esploroj, Membro de la Urugvaja Belarta Akademio, Vicprezidanto de la Urugvaja Komisiono de U.N.E.S.C.O., Urugvajo; D-ro Johan Falkberget, verkisto, Norvegujo; Fernando Ferrari, Federacia Deputito, Gvidanto de la Brazila Laborista Partio, Brazilo; Prof. René Maurice Fréchet, Membro de la Franca Akademio de Sciencoj, Membro de la Akademio de Sciencoj de Pollando kaj Nederlando kaj de la Internacia Akademio de Scienca Filozofio, Francujo; Maurice Genevoix, Membro de la Franca Akademio, Francujo; Frank G. Hanson, Redaktoro de "The Commonwealth", Kanado; Ing. Heikki H. Herlin, Mineja Konsilanto, Rotariano, estinta Membro de la Estraro de Internacia Rotario, Finnlando; Prof. Martti Hela, emerita Rektoro de la Instruista Altlernejo en Helsinki, Finnlando; Thor Heyerdahl, verkisto, Gvidanto de la Kon-Tiki-Ekspedicio, Norvegujo; Jean Hiernaux, Rektoro de la Oficiala Universitato de Kongo Belga kaj Ruanda-Urundi, Kongo Belga; Sigurd Hoel, verkisto, Norvegujo; Generalo Francisco Jaguaribe Gomes de Matos, Prezidanto de la Brazila Societo de Geografio, Brazilo; Prof. D-ro Seiji Kaya, Rektoro de la Universitato de Tokio, Prezidanto de la Ligo de Ŝtataj Universitatoj, Japanujo; Prof. D-ro Tadeusz Kotarbinski, Prezidanto de la Pola Akademio de Sciencoj, Pollando; Stanisław Kulczyński, Prezidanto de la Tutpola Paca Komitato, Prezidanto de la Pola Demokrata Partio, Pollando; Tyne Leivo-Larsson, Ambasadoro de Finnlando en Oslo, Finnlando; Mag. Rita Lopez De Llergo, Direktorino de la Nacia Instituto pri Geografio, Meksikio; Prof. D-ro G. P. Malalasekera, O.B.E., M.A., Ph. D., D. Litt., Profesoro de Pali kaj Budhana Civilizacio, Dekano de la Fakultato de Orientaj Studoj, Ĉefredaktoro de Enciklopedio de Budhismo, Unua Prezidanto de Tutmonda Federacio Budhana, Ambasadoro de Cejlono por U.S.S.R., Ĉeĥoslovakio kaj Pollando, Cejlono; Prof. D-ro Octávio Mangabeira, Senatano, estinta Ŝtatestro de Baĥa, Membro de la Brazila Beletristika Akademio, Brazilo; D-ro Carlos Martínez Durán, Rekt. de la Nacia Univers. de Gvatemalo, Gvatemalo; Lic. José Mata Gavidia, Dekano de la Fakultato pri Sociaj Studoj, Gvatemalo; Janko Maur, verkisto, Membro de la Belorusa Verkista Unuiĝo, U.S.S.R.; Lic. Adolfo Molina Orantes, Direktoro de la Nacia Komisiono de U.N.E.S.C.O., Gvatemalo; D-ro Herbert Moses, Prezidanto de la Brazila Gazetara Asocio, Brazilo; Herbert A. Mowat, publicisto, Kanado; Odd Nansen, arĥitekto, Prezidanto de la Norvega Sekcio de la Mondasocio de Mondfederalistoj, Norvegujo; Martin Niemöller, Prezidanto de Germana Pac-Societo, Germanujo; E. Norinder, Konsilanto pri Edukaj Aferoj, Svedujo; Sergej Obruĉev, Akademiano, Membro de la Akademio de U.S.S.R., U.S.S.R.; R. H. Oittinen, Ĉefdirektoro de la Instrua Administrado, Finnlando; Erich Ollenhauer, Prezidanto de la Socialista Partio, Germanujo; Prof. Marcus L. Oliphant, F.R.S., Direktoro de la Departemento de Kernfiziko en la Aŭstralia Nacia Universitato, Aŭstralio; Prof. D-ro Gyula Ortutay, folkloristo, Membro de la Prezidanta Konsilantaro de la Hungara Popolrespubliko, Rektoro de la Scienca Universitato en Budapeŝt, Hungarujo; Jean Paelinck, Guberniestro de la Provinco Katanga, Kongo Belga; Prof. Mario Pei, lingvisto, Usono; Prof. Aarni Penttilä, Rektoro de la Pedagogia Altlernejo en Jyväskylä, Finnlando; D-ro Ademar Pereira de Barros, Urbestro de São Paulo, Brazilo; Camille E. Pouliot, M.D., Ministro de Ĉasado kaj Fiŝkaptado de la Provinco de Québec, Kanado; Jorge G. Quintana, Direktoro de la Nacia Altlernejo de Biologio, Meksikio; Prof. Paavo Raviĥa, Eks-rektoro, Membro de la Akademio de Finnlando, Finnlando; D-ro Alfonso Reyes, verkisto, Prezidanto de la Lingva Akademio, Meksikio; Jules Romains, verkisto, Francujo; Prof. D-ro István Rusznyák, Prezidanto de la Hungara Scienca Akademio, Hungarujo; Prof. Gurgen Sevak, lingvisto, Akademiano, Membro de la Akademio de la Armena Respubliko, U.S.S.R.; F. E. Sillanpää, verkisto, Nobel-premiito por literaturo 1939, Finnlando; S. F. de Silva, B.A. (Lond.), Direktoro de Edukado, Cejlono; Lola Solar, Prezidantino de la Eŭropa Asocio de Kristan-demokratiaj Virinoj, Aŭstrujo; Franz Stein, Ĉefurbestro de Mainz, Hon. Senatano de la Universitato de Mainz, Germanujo; Prof. D-ro Sutarman, Profesoro de Medicina Fakultato en Djakarta, Sekretario de la Indonezia Universitato, Prezidanto de la Skolta Movado, Indonezio; Árpád Szakasits, publicisto, Prezidanto de la Hungarlanda Ĵurnalista Asocio, Hungarujo; Prof. Stanisław Turcki, Rektoro de la Varsovia Universitato, Pollando; Prof. Kalle Väisälä, Fil. D-ro, Membro de la Finna Scienca Akademio, Finnlando; Prof. Yrjö Väisälä, astronomo, Membro de la Akademio de Finnlando, Finnlando; Amand Van Roy, Rektoro de la Reĝa Ateneo, Kongo Belga; Prof. Arĥitekto José Claudio Williman, Prezidanto-Direktoro de la Instituto de Superaj Studoj, Urugvajo; Prof. D-ro Hideki Yukawa, fizikisto, Nobel-premiito, Japanujo; Franz Jonas, nacia konsilanto, land- kaj urbestro de Vieno, Aŭstrujo.

Barros Camãra, Ĉefepiskopo de Rio de Janeiro, Brazilo; Prof. Pierre Bovet, psikologo, Hon. Prof. de la Universitato de Genève, estinta Direktoro de la Internacia Oficejo pri Edukado, estinta Direktoro de la Instituto J. J. Rousseau pri Edukaj Sciencoj, Svislando; D-ro Anton F. Bruun, Direktoro de la Galathea-ekspedicio profundmara, Danlando; Prof. D-ro Pedro Calmon, Rektoro de la Universitato de Brazilo, Membro de la Beletristika Akademio, Brazilo; Prof. D-ro Milton Campos, Senatano, estinta Ŝtatestro de Minas Gerais, Brazilo; Ferreira de Castro, verkisto, Portugalujo; Prof. Emile Delage, Rektoro de la Akademio de Bordeaux, Francujo; Emile Delaruelle, Urbestro de la urbo Elisabethville, Kongo Belga; Zygmunt Dworakowski, Prezidanto de ĉefurbo Varsovio, Pollando; Prof. Carlos Sabat Ercasty, verkisto kaj poeto, Membro de la Urugvaja Belarta Akademio, Profesoro de Literaturo en la Fakultato de Humanismo kaj Sciencoj, Prezidanto de la Ateneo en Montevideo, Urugvajo; Prof. D-ro Clemente Estable, sciencisto biologo, histologo kaj pedagogo, Doktoro Honora de la Fakultato de Medicino kaj ties Profesoro, Direktoro de la Nacia Instituto de Biologiaj Esploroj, Membro de la Urugvaja Belarta Akademio, Vicprezidanto de la Urugvaja Komisiono de U.N.E.S.C.O., Urugvajo; D-ro Johan Falkberget, verkisto, Norvegujo; Fernando Ferrari, Federacia Deputito, Gvidanto de la Brazila Laborista Partio, Brazilo; Prof. René Maurice Fréchet, Membro de la Franca Akademio de Sciencoj, Membro de la Akademio de Sciencoj de Pollando kaj Nederlando kaj de la Internacia Akademio de Scienca Filozofio, Francujo; Maurice Genevoix, Membro de la Franca Akademio, Francujo; Frank G. Hanson, Redaktoro de "The Commonwealth", Kanado; Ing. Heikki H. Herlin, Mineja Konsilanto, Rotariano, estinta Membro de la Estraro de Internacia Rotario, Finnlando; Prof. Martti Hela, emerita Rektoro de la Instruista Altlernejo en Helsinki, Finnlando; Thor Heyerdahl, verkisto, Gvidanto de la Kon-Tiki-Ekspedicio, Norvegujo; Jean Hiernaux, Rektoro de la Oficiala Universitato de Kongo Belga kaj Ruanda-Urundi, Kongo Belga; Sigurd Hoel, verkisto, Norvegujo; Generalo Francisco Jaguaribe Gomes de Matos, Prezidanto de la Brazila Societo de Geografio, Brazilo; Prof. D-ro Seiji Kaya, Rektoro de la Universitato de Tokio, Prezidanto de la Ligo de Ŝtataj Universitatoj, Japanujo; Prof. D-ro Tadeusz Kotarbinski, Prezidanto de la Pola Akademio de Sciencoj, Pollando; Stanisław Kulczyński, Prezidanto de la Tutpola Paca Komitato, Prezidanto de la Pola Demokrata Partio, Pollando; Tyyne Leivo-Larsson, Ambasadoro de Finnlando en Oslo, Finnlando; Mag. Rita Lopez De Llergo, Direktorino de la Nacia Instituto pri Geografio, Meksikio; Prof. D-ro G. P. Malalasekera, O.B.E., M.A., Ph. D., D. Litt., Profesoro de Pali kaj Budhana Civilizacio, Dekano de la Fakultato de Orientaj Studoj, Ĉefredaktoro de Enciklopedio de Budhismo, Unua Prezidanto de Tutmonda Federacio Budhana, Ambasadoro de Cejlono por U.S.S.R., Ĉeĥoslovakio kaj Pollando, Cejlono; Prof. D-ro Octávio Mangabeira, Senatano, estinta Ŝtatestro de Baía, Membro de la Brazila Beletristika Akademio, Brazilo; D-ro Carlos Martínez Durán, Rekt. de la Nacia Univers. de Gvatemalo, Gvatemalo; Lic. José Mata Gavidia, Dekano de la Fakultato pri Sociaj Studoj, Gvatemalo; Janko Maur, verkisto, Membro de la Belorusa Verkista Unuiĝo, U.S.S.R.; Lic. Adolfo Molina Orantes, Direktoro de la Nacia Komisiono de U.N.E.S.C.O., Gvatemalo; D-ro Herbert Moses, Prezidanto de la Brazila Gazetara Asocio, Brazilo; Herbert A. Mowat, publicisto, Kanado; Odd Nansen, arĥitekto, Prezidanto de la Mondasocio de Mondfederalistoj, Norvegujo; Martin Niemöller, Prezidanto de Germana Pac-Societo, Germanujo; E. Norinder, Konsilanto pri Edukaj Aferoj, Svedujo; Sergej Obruĉev, Akademiano, Membro de la Akademio de U.S.S.R., U.S.S.R.; R. H. Oittinen, Ĉefdirektoro de la Instrua Administrado, Finnlando; Erich Ollenhauer, Prezidanto de la Socialista Partio, Germanujo; Prof. Marcus L. Oliphant, F.R.S., Direktoro de la Departemento de Kernfiziko en la Aŭstralia Nacia Universitato, Aŭstralio; Prof. D-ro Gyula Ortutay, folkloristo, Membro de la Prezidanta Konsilantaro de la Hungara Popolrespubliko, Rektoro de la Scienca Universitato en Budapeŝt, Hungarujo; Jean Paelinck, Guberniestro de la Provinco Katanga, Kongo Belga; Prof. Mario Pei, lingvisto, Usono; Prof. Aarni Penttilä, Rektoro de la Pedagogia Altlernejo en Jyväskylä, Finnlando; D-ro Ademar Pereira de Barbos, Urbestro de São Paulo, Brazilo; Camille E. Pouliot, M.D., Ministro de Ĉasado kaj Fiŝkaptado de la Provinco de Québec, Kanado; Jorge G. Quintana, Direktoro de la Nacia Altlernejo de Biologio, Meksikio; Prof. Paavo Ravila, Eks-rektoro, Membro de la Akademio de Finnlando, Finnlando; D-ro Alfonso Reyes, verkisto, Prezidanto de la Lingva Akademio, Meksikio; Jules Romains, verkisto, Francujo; Prof. D-ro István Ruzsnyák, Prezidanto de la Hungara Scienca Akademio, Hungarujo; Prof. Gurgen Sevak, lingvisto, Akademiano, Membro de la Akademio de la Armena Respubliko, U.S.S.R.; F. E. Sillanpää, verkisto, Nobel-premiito por literaturo 1939, Finnlando; S. F. de Silva, B.A. (Lond.), Direktoro de Edukado, Cejlono; Lola Solar, Prezidantino de la Eŭropa Asocio de Kristan-demokratiaj Virinoj, Aŭstrujo; Franz Stein, Ĉefurbestro de Mainz, Hon. Senatano de la Universitato de Mainz, Germanujo; Prof. D-ro Sutarman, Profesoro de Medicina Fakultato en Djakarta, Sekretario de la Indonezia Universitato, Prezidanto de la Skolta Movado, Indonezio; Árpád Szakasits, publicisto, Prezidanto de la Hungarlanda Ĵurnalista Asocio, Hungarujo; Prof. Stanisław Turcki, Rektoro de la Varsovia Universitato, Pollando; Prof. Kalle Väisälä, Fil. D-ro, Membro de la Finna Scienca Akademio, Finnlando; Prof. Yrjö Väisälä, astronomo, Membro de la Akademio de Finnlando, Finnlando; Amand Van Roy, Rektoro de la Reĝa Ateneo, Kongo Belga; Prof. Arĥitekto José Claudio Williman, Prezidanto-Direktoro de la Instituto de Superaj Studoj, Urugvajo; Prof. D-ro Hideki Yukawa, fizikisto, Nobel-premiito, Japanujo; Franz Jonas, nacia konsilanto, land- kaj urbestro de Vieno, Aŭstrujo.

D-ro L. L. Zamenhof

(1859-1959)

de

Profesoro D-ro Edmond Privat
Honora Prezidanto de Radio-Genève

Cento da urboj en Eŭropo kaj Sudameriko jam donis al unu el siaj stratoj la nomon de D-ro Zamenhof, kiu publikigis en 1887 en Varsovio sian unuan lernolibron de Internacia Lingvo sub la pseŭdonimo "D-ro Esperanto" — la homo, kiu esperas. Fakte li esperis ke tiu vortareto de la vortradikoj komunaj al la ĉefaj hindo-eŭropaj lingvoj servos kiel bazo de neŭtrala komunikilo inter la diversaj popoloj kaj ke la uzado donos al ĝi la kreskon, la riĉigon kaj la fluecon de vivanta lingvo.

Por tion ebligi li fiksas kelkajn simplajn regulojn de gramatiko kaj liston de prefiksoj kaj sufiksoj por derivado normala. Li fidis al la vivo kaj naturo por la resto anstataŭ proponi artefaritan fabrikaĵon tute pretan. Ĉefe en tiu saĝo kuŝis lia scienca klarvido. Efektive la lingvo vokalsona, kiun oni aŭdas nun el diverslandaj radio-stacioj kaj en ĉiam pli multaj internaciaj kongresoj sub la nomo Esperanto konstruis sin mem per la uzado sur la fundamento donita de Zamenhof, kiu volis esti iniciatoro, ne kreinto, kiel li mem diris.

Profeta motivo

La kresko de la lingvo kaj de la literaturo en Esperanto estis forte helpata de la idealista motivo, kiu inspiris Zamenhof kaj liajn amikojn. Li naskiĝis en 1859 en Bjalistok en Litovio, tiu orienta regiono de la malnova pola respubliko, kiun aneksis la rusa imperio kaj kien la caroj forpuŝis centmilojn da Hebreoj. La patro de Zamenhof estis mem Hebreo kaj instruisto de fremdaj lingvoj.

La filo Ludoviko suferis, kiel infano, pro la malamikaj rilatoj inter la diverslingvaj partoj de la loĝantaro de Bjalistok. Tie la oficialuloj estis grek-ortodoksaj kaj parolis ruse, la riĉuloj plej parte katolikoj parolantaj pole, la malriĉuloj parte Litovoj aŭ Blankkrutenoj, la komercistoj plej ofte Hebreoj parolantaj *jiddisch* kaj vivantaj en aparta kvartalo. Lingvoj, kutimoj, religioj malsamis kaj antaŭjuĝoj dividis la homojn. La knabo havis la impreson ke la nescio kaj nekompreneo kaŭzis multajn el la plej krudaj interbataloj. Li opiniis

ke komuna lingvo jam forigus parton de la baroj kaj ebligus almenaŭ interkompreniĝon inter malsamaj popoloj.

Tiu ideo lin sekvis al Varsovio, kien migris la familio kaj kie li eniris la gimnazion. Ĝi sekvis lin dum lia tuta kariero kun la volo dediĉi sian vivon al la repaciĝo inter la nacioj. Li profunde sentis la fundamentan unuecon de la homaro sub la diversaj apartiĝoj kaj akcentis tiun senton en siaj postaj poeziaj verkoj, ĉar li havis poetan kaj profetan spiriton.

Zamenhof antaŭvidis ke venos tempo kiam la homaro serĉos sian animon kaj bezonas organon por ĝin esprimi. Tiu konvinko instigis lin ne nur al lingva, sed al literatura iniciato kaj ĝi certe donis flugilojn al la Esperanto-movado kun ĝiaj kongresoj, ĝia gazetaro kaj ĝia libraro.

Tion konstatis la Ligo de Nacioj en la raporto voĉdonita de sia ĝenerala kunveno en 1922 kaj U.N.E.S.C.O. en sia rezolucio de 1954, deklaranta ke la rezultatoj atingitaj per Esperanto korespondas al la celoj de U.N.E.S.C.O. mem por akceli tuthomaran konscion. Ĝuste tion deziris Zamenhof.

La kariero

Neniu lingvo vivas sen animo. Ĉiu nacia idiomo esprimas la animon de unu popolo aŭ civilizo. Esperanto esprimas sopiron de la homaro al unueco kaj tiu inspiro klarigas la sekreton de ĝia viviĝo. Eĉ laŭ pure lingva vidpunkto la fenomeno vekas intereson. Zamenhof mem rakontas ke li kaj liaj gimnazianaj amikoj kantis en la nova lingvo pri la falo de la malamikaj baroj inter la nacioj en 1878, kiam ili lernis la internacian vortaron, kiun li kunmetis jam kiel knabo. Sed lia realista patro konfiskis la kajerojn, sur kiuj la junulo skribis vortaron, gramatikon aŭ poemojn kaj ordonis al sia filo forlasi la revojn por prepari karieron. Li do finis la gimnazion, studis medicinon en Moskvo kaj fariĝis kuracisto. Poste li ankoraŭ studis en Vieno kaj specialiĝis en Varsovio kiel okulisto.

Tamen lia revo neniam forlasis lin kaj al sia vivcelo li restis obstine fidela.

En 1887 li edziĝis kaj lia bopatro Silbernik helpis finance la eldonon de la Unua Lernolibro kaj internacia vortaro de D-ro Esperanto. Tre malrapide alvenis aliĝoj, ĝis kiam Leo Tolstoj, la granda rusa verkisto, legis la libreton kaj en la revuo de la eldonejo *Posrednik* en 1894 publike rekomendis al ĉiuj kristanoj lerni la lingvon ĉar "la ofero estas tiel malgranda kaj la eblaj rezultoj tiel egaj por la homaro ke neniu devus rifuzi la provon".

En la lastaj jaroj de la centjaro famaj francaj scienculoj interesiĝis kaj en la Akademio de Moralaĵ kaj Politikaĵ Sciencoj George Picot prezentis raporton de la ĝeneva filozofo Ernest Naville, kiu rekomendis la enkondukon de Esperanto en la lernejojn de la tuta mondo.

Gazetoj en la lingvo ekaperis en diversaj landoj, kursoj okazis, societoj fondiĝis kaj en 1905 okazis en Boulogne-sur-Mer la unua universala kongreso en Esperanto, kie partoprenis D-ro Zamenhof mem kun generalo Sébert de la Franca Akademio de Sciencoj, la psikologo Boirac, Rektoro de la Universitato en Dijon kaj 800 pioniroj de 30 landoj.

Estis la unua vasta internacia renkontiĝo en kiu nur Esperanto estis uzata. Estis ankaŭ la unua okazo por multaj kongresanoj aŭdi kaj paroli la lingvon. Oni demandis sin ĉu la eksperimento sukcesos kaj la ĵurnalistoj miris pri la plena interkompreno kaj facileco en la diskutoj. Se oni komparas la nunajn kongresojn kun la unua, oni rimarkas kompreneble pli grandan unuecon en elparolado, pli rapidan fluecon kaj pli oftan elokventecon, sed tiam la lingvo sonis jam viva, speciale sur la lipoj de la Slavoj.

La plej mirigita estis D-ro Zamenhof mem, kiun la franca registaro faris tiam kavaliro de la honora legio. El la buŝo de la kongresanoj sonis la nova lingvo, kiu kreskis el la bazo, kiun li provis kun siaj kungimnazianoj dum sia juneco. Sed lin eĉ pli impresis la ĝenerala frateco inter la diversnaciaj delegitoj kaj ilia liberiĝo el ĉiuj kompleksoj de malsupereco aŭ supereco de la gepatra lingvo. Tion li esprimis en memorinda parolado, en kiu li ĝojis pri tiu egaleco. Siaflanke la kongresanoj estis impresitaj de lia videbla modesteco, eĉ ioma timemo antaŭ la publiko. Li tenis sin ĉiam tre humile kaj lasis la ĉefan lokon al aliaj personoj.

Ideoj pri etiko

La dua universala kongreso de Esperanto okazis en 1906 en Genevo kaj tie D-ro Zamenhof esprimis sian doloron pri la pogromo, kiu ĵus sangumis la stratojn de lia naskiĝurbo Bjalistok. La tria okazis en Cambridge en 1907 kaj poste la urbestro de Londono, Sir Vezej Strong, ceremonie akceptis D-ron Zamenhof en la Guildhall ĉe granda publika kunveno, kie li respondis per rimarkinda parolado pri la diferenco inter patrujamo kaj ŝovinismo. Ĉiujare kunvenis tiaj kongresoj kaj Zamenhof

ĉiam klarigis per memorinda malferma parolado siajn ideojn pri toleremo kaj homaj rajtoj.

Post 1912 li ĉesigis tiun kutimon kaj decidis forlasi ĉian honoran lokon en la kongresoj por repreni sian plenan privatan liberecon. Lin priokupis etikaj problemoj de la homaro kaj li deziris lasi la pure lingvan flankon en la manoj de la fonditaj organizaĵoj, interalie de la Akademio de verkistoj kaj lingvistoj, kiu kontrolis la normalan evoluon de la lingvo kaj oficialigis la novajn vortojn enkondukitajn per la internacia vivo kaj uzado.

Al la mondkongreso pri rasoj en Londono en 1911 li prezentis raporton subtenante la scienculojn, kiuj opiniis la tradiciajn kaj morajn diferencojn pli realaj ol la fizikaj. Laŭ li ĉefe apartigas la popolojn iliaj lingvoj kaj religiaj kutimoj. Pro tio li proponis instruadon de neŭtrala lingvo kaj akcepton de neŭtrala tuthomara etiko. Ĉiu homo estu fidela al sia gepatra lingvo kaj propra religio, sed li rilatu kun fremduloj per neŭtrala lingvo kaj komuna etiko laŭ la konsilo: "Ne faru al la ceteraj tion, kion vi ne ŝatus ke oni faru al vi".

La unua mondmilito en 1914 estis kruela bato al tiu granda amiko de la homaro. Rusaj kaj poste germanaj armeoj okupis Varsovion dum li jam suferis je grava kormalsano. En 1916 li verkis "Leteron al Diplomatoj" por rekomendi ke oni ne nur pripensu la nurajn ŝanĝojn de landlimoj, sed garantii la lingvaj kaj religiajn rajtojn de la malplimulto. Li ankaŭ konsilis doni nomojn neŭtralajn, prefere geografiajn, al provincoj aŭ regnoj kun diverslingva loĝantaro por eviti ke partoj de ĝi sin sentu fremdaj en propra lando se oni nomas ĝin per la nomo de unu gento reganta. Li laŭdis tiajn nomojn kiel Usonon aŭ Svislandon, kiuj ne entenas nomon de unu gento super ceteraj. Kiel povus ekzisti harmonio se oni nomus Svislandon "Alemanujo" aŭ "Romanujo" aŭ se oni nomus Belgion "Flandrujo" aŭ "Valonujo"?

D-ro Zamenhof mortis en aprilo 1917. Lia Internacia Lingvo perdis dufoje per mondmilitoj grandan parton de siaj adeptoj kaj bibliotekoj, sed dufoje reviviĝis kaj revastiĝis. Nun ĝin uzas ne nur Esperanto-kongresoj sed aliaj mondkonferencoj teknikaj aŭ specialistaj, ekzemple kunvenoj edukistaj, katolikaj, protestantaj, turistaj, laboristaj k.t.p. Ĉie, kien ĝi penetras, ĝi enkondukas ankaŭ iom de la homara spirito, kiu inspiris ĝian iniciatoron Zamenhof. Laŭ pure lingva vidpunkto ĝi evoluas kaj kreskas laŭ la natura maniero, kiun li antaŭvidis.

La presita verkaro de Zamenhof entenas ne nur liajn poemojn, paroladojn kaj artikolojn, sed ankaŭ tradukojn de Gogol, de Shakespeare, de Dickens, de Goethe, de Molière, de Andersen kaj de la tuta Malnova Testamento, kiun eldonis en Esperanto la angla Biblia Societo kune kun la Nova. Li estis talenta verkisto kun forta sento pri muzika ritmo de la stilo.

La plej granda monda kampanjo en la historio de la Internacia Lingvo

La publikigitaj dokumentoj prezentas la ĝeneralan kadron, en kiu evoluos unu post la alia la multnombraj aranĝoj en la Zamenhof-Jaro. Eĉ supraĵa tralego vidigas klare la ĉefan celon: esprimi omaĝon al la aŭtoro de la Internacia Lingvo kaj samtempe konsiderinde disvastigi Esperanton ĉie en la mondo. Por atingi tiun celon estas necese, ke absolute ĉiuj Esperanto-organizaĵoj kaj unuopuloj intensigu sian agadon kaj kunlaboru laŭ la principoj entenitaj en la Baza Programo.

1. Agado sur Tri Niveletoj

La Esperanto-Movado estas unueca. Ni ĉiuj havas la saman komunan celon. Sed organize ni agas sur tri niveletoj: internacia, landa kaj loka. Ankaŭ la agado en la Zamenhof-Jaro okazos sur tiuj tri niveletoj. Ili estas same signifaj. Nur unu aŭ nur du ne sufiĉas. Sole la tri kune, kompletigante unu la alian kaj helpate unu de la alia, donos kontentigajn rezultojn. Tio estas gravega. Oni plej serioze atentu, ke eventuala neagado sur unu nivelo malhelpas kaj eĉ povas endanĝerigi la tuton. Tial harmonia kunagado estas esenca.

La IOK fiksas la ĝeneralajn liniojn kaj distribuis la taskojn.

La organoj de UEA, ekzemple, prizorgos, ke la Deklaracio, la Baza Programo, la artikolo de Prof. Privat, kune kun la nomoj de la IPK, estu senditaj en taŭga formo en pluraj lingvoj ne nur al ĉiuj regulaj ricevantoj de la dokumentoj de CED, sed ankaŭ al ĉiuj interŝtataj organizaĵoj kaj internaciaj privataj asocioj. La organoj de UEA ankaŭ liveros dum la tuta jaro 1959 informojn kaj artikolojn al internaciaj organizaĵoj kaj instancoj. Same tiel la organoj de UEA liveros al la landaj asocioj, al la landaj informaj fakoj, al la membroj de TEĴA, al diversaj radio-stacioj k.t.p. informojn kaj artikolojn por publikigo aŭ disaŭdigo en la naciaj lingvoj. Mallonge, la tuta agado sur la internacia nivelo estos plenumita de la diversaj organoj de UEA.

Sed la landaj asocioj kaj la rektaj kunlaborantoj en regionoj sen landa asocio devos prizorgi, ke samtempe, laŭ la indikoj de la centra internacia organoj, la fundamentaj materialoj estu tuj en la komenco de la jaro senditaj en la naciaj lingvoj al ĉiuj sciencaj, literaturaj, klerigaj, kulturaj, komercaj kaj aliaj institucioj; al la direktoj de televido

kaj radio; al la universitatoj kaj lernejoj; al kiel eble plej multaj profesoroj, instruistoj kaj al ĉiuj aliaj kulturaj agantoj. Poste, dum la tuta jaro 1959, la organoj de la landaj asocioj devos prizorgi diversajn aliajn punktojn de la Baza Programo, ekzemple publikigon de nacilingva speciala numero de sia gazeto, solenajn kunsidojn dum la landaj kongresoj, liveron de prelegoj al la lokaj grupoj, tradukadon kaj aperigadon de informoj ricevotaj de UEA k.t.p.

Fine, la lokaj grupoj devos prizorgi altnivelajn publikajn aranĝojn, prelegojn en universitatoj kaj lernejoj, malfermadon de novaj kursoj, organizado de novaj societoj en la apudaj lokoj k.s.

Siavice la fakaj kaj neneŭtralaj Esperanto-organizaĵoj havos la taskon agi en siaj medioj per prelegoj, artikoloj, eventuale specialaj kursoj, solenaĵoj dum siaj internaciaj kongresoj kaj taŭgaj aranĝoj en la fakaj neesperantistaj kongresoj.

Tiu tuta agado sur diversaj niveletoj devas esti ligita kun la instruado de la lingvo laŭ ĉiuj eblaj manieroj: vesperaj kursoj, klasoj en lernejoj, radio-kursoj, korespondaj kursoj, disvendado de lernolibroj al la memlernantoj. Per bona laboro oni povas facile atingi almenaŭ duobligon de la nombro de personoj, kiuj nun parolas la Internacian Lingvon. Kaj tio signifos — devas signifi — la duobligon de la membroj de ĉiuj niaj organizaĵoj.

2. Informado

Evidente, la informado pri Esperanto sur ĉiuj niveletoj estos konsiderinde intensigita en 1959. Sed sukcesa laboro sur tiu ĉi kampo dependas ne nur de la kvanto, sed ankaŭ de la kvalito de informado. La principoj, akceptitaj tiurilate en Frostavallen en 1956 kaj publikigitaj baldaŭ ankoraŭfoje, restas plene validaj. Ĉiu, kiu laboras por disvastigo de la Internacia Lingvo, devus daŭre atenti ilin. Ĉi tie estu nur dirite, ke estas necese utiligi ĉiujn metodojn de informado kaj diversajn rimedojn, se oni deziras atingi bonajn rezultojn. Aparta atento devas esti dediĉita al la kvalito. Informi objektivite kaj serioze pri Esperanto signifas fari al la afero la plej grandan servon. Oni evitu ĉion, kio povas malutili al la prestiĝo de la Internacia Lingvo kaj de la Esperanto-Movado. Tute speciale estas utile

atentigi, ke la vorto "Majstro", precipe se ĝi aperas en kiu ajn nacia lingvo, estas tute neoportuna. Zamenhof mem plurfoje insiste petis, ke oni ne nomu lin tiel. Tion li faris ne nur pro sia konata modesteco, sed ankaŭ tial, ĉar certe li bone komprenis, ke tiu kaj similaj esprimoj kreas impreson, ke la Esperanto-Movado estas ia sekto. D-ro L. L. Zamenhof estas personeco de monda formato. Ni traktu lin kiel tian kaj ne kiel "ĉefon" de iu "sekto". La amon al lia genia verko kaj la respekto por liaj noblaj ideoj ni ĉiuj montru per perfekta ekregio de la lingvo, per disvastigo de Esperanto, per kreskigo de la literaturo en la Internacia Lingvo, per ĉiuflanka agado en la Zamenhof-Jaro, kaj ne per esprimoj, kiuj povas malutili kaj eĉ endanĝerigi lian laboron kaj la laboron de multaj aliaj tra la mondo.

3. Rolo de Unuopuloj

En la lasta linio ĉio dependas de la laboro de la unuopuloj. En la Zamenhof-Jaro ilia rolo estas speciale grava. Ne nur tial, ĉar de ilia laboro dependas la efika agado de ĉiuj niaj organizaĵoj, sed ankaŭ tial ĉar ĉiu unuopulo, eĉ la plej izolita, povas konsiderinde rekte helpi. En la mondo hodiaŭ estas almenaŭ 2.000 esperantistoj-instruistoj. Ĉiu el ili facile povus fari prelegon pri Zamenhof ne nur en sia lernejo, sed ankaŭ en la lernejoj de sia urbo kaj de la apudaj lokoj. Niaj ĵurnalistoj, sciencistoj, kuracistoj, juristoj, fervojistoj, skoltoj, studentoj k.t.p. faru prelegojn en siaj fakaj medioj, aperigu artikolojn en siaj fakaj revuoj kaj gazetoj. Kiel dirite, la Informa Fako de UEA liveros al la landaj kaj fakaj asocioj artikolojn de elstaraj esperantistoj de diversaj landoj. Se oni mem ne havas tempon por verki artikolon aŭ kunmeti prelegon, oni utiligu tiujn materialojn. En 1959 absolute ĉiu esperantisto devus fari almenaŭ unu prelegeton kaj publikigi almenaŭ unu informon. Multaj facile povus ankaŭ organizi malgrandan kurseton en sia faka medio. Ĉiu esperantisto, plue, devus varbi apogantojn por UEA kaj tiucele senprokraste mendi libreton kun 10 atestiloj de la Centra Oficejo de UEA.

4. Fortikigo de Niaj Organizaĵoj

Konsiderinde granda nombro da esperantistoj estas ankoraŭ ekster niaj organizaĵoj. La statistiko montras, ke, ekzemple, unu triono de la partoprenantoj en la U.K. de Esperanto, ne estas individuaj membroj de UEA. Fine de oktobro 1958, UEA havis 25.538 membrojn, el kio 18.925 estis asociaj membroj, do ricevis neniun publikaĵon de UEA, kaj 756 estis M. J., do ricevis nur la Jarlibron. Signifas, ke nur ĉ. 6.000 personoj regule ricevas la organon de la Asocio. Tiu ĉi stato, kvankam multe pli bona ol antaŭ kelkaj jaroj, estas tamen ankoraŭ tre bedaŭrinda. Estas absolute nekompreneble, ke oni povas esti esperantisto kaj ne legadi regule almenaŭ la centran revuon de la Esperanto-Movado. UEA streĉas ĝis maksimumo siajn fortojn por progresigi Esperanton en la mondo. Sen UEA ne ekzistus la Jarlibro, ne ekzistus la U.K., ne funkcius la monda informado, nek CED, nek ISU, nek estus atingitaj la sukcesoj ĉe UNESKO, nek entute io ajn farita sur la internacia nivelo. Eĉ la Zamenhof-Jaro ne povus esti aranĝita en mondaj kadroj, se UEA ne estus iniciatinta kaj organizinta ĝin. UEA laboras por la intereso de la tuta Esperantismo kaj ĝi meritas la apogon de absolute ĉiu esperantisto. Estas necese fortikigi UEA en la Zamenhof-Jaro. Ĉiu esperantisto aliĝu al UEA kiel Membro-Abonanto. La aliĝintaj landaj asocioj, la kunlaborantaj fakaj organizaĵoj, la lokaj grupoj kaj ĉiu unuopa Individua Membro de UEA instigu al aliĝo kaj insiste varbu novajn M.A. ! Por efektive malaltega kotizo la M.A. ricevas la ampleksan Jarlibron en du partoj (ĉi-jare pli ol 600 paĝoj) kaj la monatan organon de la Asocio, kiu verŝajne en 1959 estos 20-paĝa. Oni komprenu, ke ju pli forta estas UEA, des pli efike ĝi povas labori por Esperanto. Oni ankaŭ komprenu, ke la aranĝoj en la Zamenhof-Jaro prezentos la plej grandan kampanjon en la tuta historio de la Internacia Lingvo kaj estos, se ĉio sukcesos kiel planite, firma bazo por la lasta etapo ĝis la fina venko.

Al tiu granda celo ĉiu kontribuu ĝis maksimumo de siaj fortoj kaj eblecoj !

Prof. D-ro Ivo Lapenna

Kelkaj Sloganoj

En gazetoj, sur flugfolioj kaj afiŝoj ofte restas libera spaco, kiun oni ne scias kiel trafe utiligi. En la Zamenhof-Jaro estus oportune presigi taŭgajn sloganojn, kiuj instigos al lernado de Esperanto. Slogano per si mem certe ne sufiĉas, sed aldonita al aliaj formoj de informado, ĝi povas multe helpi. Por esti efika, slogano devas esti simpla, klara, tuj komprenebla kaj imperativa. Jen kelkaj sugestoj, modifeblaj, se necese, laŭ la cirkonstancoj en diversaj landoj :

(1) Dekmiloj da personoj en ĉiuj landoj jam parolas la Internacian Lingvon. En la jaro 1959, dediĉita al la memoro de la aŭtoro de Esperanto D-ro L. L. Zamenhof, aliaj dekmiloj lernas ĝin ĉie en la mondo.

Ne plu atendu : ellernu Esperanton !

(2) Ju pli da personoj scias Esperanton, des pli granda estas ĝia valoro por ĉiu.

Lernu la Internacian Lingvon !


(3) Lernu Esperanton — La Internacian Lingvon de la moderna homo !

(4) Antaŭkondiĉo de vera internacia kompreniĝo estas komuna neŭtrala lingvo : lernu la Internacian Lingvon Esperanto !

(5) Milionaj amasoj estas ankoraŭ mutaj kaj surdaj ekster siaj nacioj. — La scio de Esperanto malfermas la pordojn de la mondo !

(6) Eĉ la plej altaj intelektaj elitoj sentas sin barbaroj en fremdaj lingvaj medioj. Helpu al forigo de la lingvaj baroj : Lernu Esperanton !

(7) La partopreno en la internacia vivo ne plu estas privilegio de kelkaj, sed rajto de ĉiuj. Realigu tiun rajton : lernu Esperanton !



La nova UNESKO-konstruaĵo en Parizo, inaŭgurita por la 10-a Konferenco.

Kiel en Montevideo kaj en Delhi antaŭ kvar kaj du jaroj respektive, ankaŭ ĉijare, dum la Dekaj Ĝenerala Konferenco de UNESKO, okazinta en Parizo inter la 5-a de novembro kaj la 5-a de decembro, UEA estis reprezentita. Nia observanto, prof. Ivo Lapenna, kiu ne povis ĉeesti pro troa okupiteco, estis anstataŭata de du komitatanoj, s-ro Jean Thierry kaj la subskribinto.

Dum tiu ĉi Konferenco la palmoj kaj varmaj plaĝoj de Montevideo forestis, same kiel la verva bunteco de la antikva kaj renaskiĝanta Hindujo. Anstataŭe ĉeestis la bruo de motoroj kaj la metrooj parizaj, la rapidema, senpersona homamaso, kun la triumfarko kaj la Ejfela turo en la fono. La grandaj amuzejoj aperis nur sur la murafiŝoj por ni. Tempo — kaj mono — mankas por alproksimiĝi al ili. La grandioza, moderna "Y"-forma nova konstruaĵo de UNESKO englutis nin matene, kaj kiam ĝi liberigas nin vespere, la piedoj jam aŭtomate portas nin al la subtera trajno, kiu portos nin al la hotelo.

Tamen, ne ĉiutage ni ambaŭ ĉeestis la kunsidojn. Kelkfoje ni alterne vizitis la ejon. Plurfoje ni renkontiĝis kun la brazila samideano s-ro Sylla Chaves, membro de la sekretariato de UNESKO, tre helpema kaj amika. Unu tagon ni invitis internacian grupon da esperantistoj por viziti la konstruaĵon. Ĉeestis personoj el kvin kontinentoj: La ĵus menciita s-ro Chaves kaj geedzoj Culbert (Usono), f-ino Joŝiko Kajino (Japanujo), Gesinjoroj Matasin el Aŭstralio, s-ro Dansou Agbalon Christophe el Sudafrika Unio, kaj la du anstataŭaj observantoj, franco kaj jugoslavo, el Eŭropo.

Laŭ la instrukcioj de la Estraro, nia ĉefa tasko estis zorgi, ke la konsultaj rilatoj de UEA kun UNESKO estu plilongigitaj. Mi tuj diru, ke tiu tasko estis tre facila, ĉar — post la tre efika kunlaborado de UEA kun UNESKO dum kvar jaroj sur diversaj kampoj — neniu klopodis nei al ni tiun rajton. Inter la kvar organizaĵoj, proponitaj de la Plenuma Komitato de UNESKO por forpreno de la konsultaj rilatoj, UEA ne troviĝis. Tio mon-

UEA EN LA 10-a KONFERENCO DE UNESKO

tras, ke la ĝenerala agado de Universala Esperanto-Asocio kaj tute speciale ĝia tre aktiva helpo al tiuj punktoj de la Programo de UNESKO, kiuj esence respondas al la celoj de la Esperanto-Movado, renkontis rekonon kaj respekton. Kaj mi devas ĉi tie aldoni, ke laŭ la interparoladoj, kiujn mi havis kun diversaj funkciuloj de UNESKO, tiuj eksplicite esprimis estimon al nia laboro kaj al la agado de nia ĝenerala sekretario, kiu estas ŝarĝita de la Estraro ankaŭ pri la rilatoj kun UNESKO. En tiaj kondiĉoj la Ĝenerala Konferenco akceptis dum sia kunsido la 4-an de decembro la proponon de la Plenuma Komitato kaj plilongigis la konsultajn rilatojn de UEA kun UNESKO por pliaj kvar jaroj.

Sed, krom tiu oficiala tasko, ni havis alian, eksteroficialan: konatiĝi kun kiel eble plej multaj delegitoj, prezenti al ili en taŭga formo la signifon de Esperanto kaj tiel en personaj kontaktoj ĝenerale plifirmigi la pozicion de la Internacia Lingvo. Mi renkontis multajn amikojn konatajn el la Konferenco en Delhi kaj akiris novajn. Kaj, ĉar "amikoj de miaj amikoj estas ankaŭ miaj amikoj", ili preskaŭ ĉiuj eksimpatiiis kun Esperanto, aŭ almenaŭ akiris iom da scio kaj respekto por ĝi.

La laboro de la Konferenco estis dividita en pluraj komisionoj, kiuj poste resumis siajn laborojn dum la lastaj tagoj en kunsidoj de la Pleno de la Ĝenerala Konferenco. Inter la multaj decidoj de la Konferenco estas kelkaj, kiuj interesas nin.

La 10-a Konferenco de UNESKO decidis plintensigi sian kunlaboradon kun la neregistaraj organizaĵoj, kaj ankaŭ plialtigi estontece la sumon dediĉitan por subvencii iliajn agadojn. Precipe oni deziras helpi ilin en la realigo de iliaj projektoj, kaj kuraĝigi la disvastiĝon de tiuj organizaĵoj tra ĉiuj geografiaj regionoj, precipe en Azio, Afriko kaj Latinameriko.

Oni decidis dividi ĉiujn neregistarajn organizaĵojn en konsultaj rilatoj kun UNESKO en tri kategoriojn, laŭ la grado en kiu ili kontribuas al tiu ĉi en la preparo kaj efektiviĝo de ĝiaj projektoj.

La Konferenco estis gandparte sub la signo de

(daŭrigo paĝo 11)

CED

Centro de Esploro

kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, WEMBLEY, Middlesex, Anglujo
Telefono ARNold 90-81

ESPERANTO-LITERATURO EN PUBLIKAJ BIBLIOTEKOJ

Jus estas finita la Internacia Enketo pri la Esperanto-literaturo en publikaj biblioteko. La celo de tiu ĉi granda enketo estis esplori la kvantan kaj kvalitan nunan disvastigon de la Esperanto-literaturo en la publikaj biblioteko kaj, surbaze de la rezultoj de la esploro, serĉi rimedojn por plibonigi kaj plirapidigi tiun disvastigon per bone elpensita, celtrafa sistemo de distribuado de la Esperanto-literaturo en la estonteco.

Mag. F. Winkel, kunlaboranto de CED, komencis tiun ĉi temporaban enketon sendante cirkuleron en la angla, franca, germana, hispana, itala kaj portugala lingvoj al 1062 publikaj biblioteko en la tuta mondo. Li elektis, kompreneble, por tiu ĉi celo nur la gravajn, ĉefajn bibliotekojn en ĉiuj landoj. Al la enketo respondis 439 biblioteko. Tiu ĉi nombro estas tre kontentiga.

Surbaze de la ricevitaj respondoj al la enketdmandaro, Mag. Winkel kunmetis ampleksan raporton de 38 dense tajpitaĵoj. El tiu raporto, kun koncizaj informoj ordigitaj laŭ la landoj, kaj el la akompana letero ni ĉerpas jenajn plej gravajn konkludojn:

La kolektita materialo estas treege interesa kaj jetas rimarkindan lumon sur multajn, ofte hazardajn, faktorojn, kiuj ŝajnas influi la disvastigon de la Esperanta literaturo en publikaj biblioteko. Inter la faktoroj, kiuj povas influi tiun disvastigon, la jenaj estas la plej atentindaj:

(i) Ago de privata esperantisto, kiu heredigas sian privatan Esperanto-libraron al la loka biblioteko;

(ii) aktiveco de loka Esperanto-grupo, kiu serĉas kontakton kun la direktoro aŭ ĉefbibliotekisto de la biblioteko kaj, en kunlaboro kun li, aranĝas ekspoziciojn, aŭ ordigas kaj klasigas la Esperanto-librojn — eble disajn — en la biblioteko;

(iii) havigo de libroj por la biblioteko okaze de Esperanto-kongreso en la koncerna urbo (tre interesa plia efiko de bone organizita Esperanto-kongreso);

(iv) aktiveco de la bibliotekisto mem.

La enketo klare montras, ke multaj gravaj publikaj biblioteko posedas relative grandan nombron da esperanto-libroj — ofte eĉ de tre alta literatura nivelo — kiuj tamen estas neglektataj (ne klasigitaj, ne presitaj en katalogoj ktp.) pro persona malinteresiĝo de la bibliotekisto kaj kelkfoje ankaŭ pro nesufiĉa interesiĝo de la personoj parolantaj la Internacian Lingvon. Aliflanke multaj bibliotekistoj esprimis sian ŝaton por Esperanto kaj ĝia literaturo. Ili deklaris sin pretaj pliriĉigi la Esperanto-fakon de siaj biblioteko, se la financaj rimedoj permesos tion. Pluraj bibliotekistoj ankaŭ esprimis la deziron kunlabori kun la lokaj Esperanto-grupoj por ordigi kaj klasigi la Esperanto-librojn en siaj biblioteko.

La enketo plue montras, ke nur tre malmultaj biblioteko abonas Esperanto-revuojn kaj gazetojn. Montriĝis ankaŭ, ke multaj biblioteko volonte akceptas donac-abonojn. Estas la tasko de la lokaj esperantistoj instigi siajn bibliotekojn aĉeti Esperanto-librojn kaj abonati Esperanto-revuojn, aŭ havigi al la biblioteko alimaniere tiujn publikajojn.

La enketmaterialo estas interesa ankaŭ tial, ĉar CED ricevis bonan superrigardon pri la lokoj kaj biblioteko, en kiuj troviĝas kelkfoje eĉ tre maloftaj Esperanto-libroj, ekzemple verkoj el la unua periodo, jam tute elĉerpitaj kaj neniam poste represitaj.

La enketmaterialo klare indikas, ke Esperanto ĝenerale jam penetris eĉ en la plej grandajn ŝtatajn bibliotekojn, sed ke, aliflanke, ĝi preskaŭ tute mankas en la sciencaj fakbiblioteko. Speciale sur la tereno de la scienca literaturo la influo de Esperanto estas ankoraŭ malgranda.

Estas rimarkinde, ke ĝenerale en la gravaj ŝtataj biblioteko la plimulto de la Esperanto-libroj apartenas al gramatikoj kaj vortaroj, dum en la publikaj biblioteko urbaj kaj vilaĝaj la Esperanto-libroj grandparte estas beletristikaj verkoj.

Por plibonigi la disvastigon de la Esperanto-literaturo la enketinto sugestas jenajn rimedojn:

a) En tiuj biblioteko, kiuj jam disponas pri granda nombro da bonaj Esperanto-libroj, oni katalogu ilin, arangu apartan Esperanto-fakon kaj prizorgu bone presitan katalogon;

b) el la biblioteko, kiuj jam havas apartan Esperanto-fakon, sed malnoviĝintan, oni livernu taŭgajn Esperanto-librojn por modernigi la fakon;

c) kun tiuj bibliotekistoj, kiuj proprainiciate ŝatas aranĝi apartan Esperanto-fakon en siaj biblioteko, oni serĉu kontakton kaj helpu realigi la planon.

Estas maleble publikigi en "Esperanto" la liston de ĉiuj biblioteko, kiuj posedas Esperanto-librojn kaj estas pretaj ampleksigi la Esperanto-fakon, ĉar ilia nombro estas tro granda. La landaj asocioj, kiuj serioze interesiĝas pri la plibonigo de la pozicio de la Esperanta libro en la publikaj biblioteko sur sia teritorio, bonvolu sin turni rekte al Mag. F. Winkel, kunlaboranto de CED por la biblioteko, Plataanweg 18, Rotterdam (Schiebroek), Nederlando, kiu volonte donos sian helpon.

CED esprimas sian dankon kaj gratulon al Mag. F. Winkel pro la bonege plenumita laboro.

ESPERANTO EN UNESKO-DOKUMENTOJ KAJ PUBLIKAJOJ

En "Esperanto", februaro, 1955, sur p. 67 kaj en "Esperanto", aprilo, 1957, sur p. 60 aperis listoj de dokumentoj de UNESKO, kiuj rilatas al la Internacia Lingvo. Ankaŭ en aliaj numeroj de "Esperanto" plurfoje estis menciitaj gravaj dokumentoj aŭ publikajoj de UNESKO, kiuj rilatas al Esperanto.

Ĉi-sube ni donas plian liston de publikajoj aŭ dokumentoj, eldonitaj de UNESKO aŭ de UN, kiuj rilatas plene aŭ parte al la Internacia Lingvo, aŭ en kiuj Esperanto estas menciita. Por faciligi la orientigon al la personoj, kiuj deziras ilin trastudi, en la listo estas konservita la originala titolo kaj aldonitaj la koncernaj signoj kaj datoj:

1. *Scientific and Technical Translating and Other Aspects of the Language Problem* (Scienca kaj Teknika Tradukado kaj Aliaj Aspektoj de la Lingva Problemo), dua eldono, Februaro, 1958. Tiu ĉi grava verko de D-ro J. E. Holmstrom havas 282 paĝojn. La tuta ĉapitro 6.6 portas la titolon "Esperanto" kaj estas presita sur la pp. 192-197. La opinio de la direktoro de CED estas presita ankaŭ en aliaj lokoj, ekzemple sur pp. 66 pri la alfabeto, 182 ĝenerale pri la lingva problemo (tradukita el la Internacia Lingvo), 191 pri la disvastigo de Esperanto, 194 pri la internaciaj kongresoj (represita el la revuo *NGO-Bulletin* de aŭgusto/sept. 1953). Kvankam tiu ĉi eldono estas konsiderinde pli bona kaj, dank' al la kontribuo de CED, pli objektiva ol la unua eldono, tamen ankaŭ en ĝi troviĝas mankoj kaj kelkaj science neakcepteblaj starpunktoj. En unu el la sekvantaj numeroj de "Esperanto" aperos recenzo.

2. *Bulletin International des Sciences Sociales* (Internacia Bulteno de Sociaj Sciencoj), Vol. X, n-ro 1, 1958. Tiu ĉi numero de la revuo publikigas sur la pp. 166-167 objektivan informon pri la Internacia Seminario "La Kulturoj kaj Civilizoj de la Mondo", okazinta en Grésillon en julio 1957.

3. *Index Translationum*, Vol. 7, 8 kaj 9 enhavas Esperantlingvaj tradukojn, publikigitajn en diversaj landoj.

4. *Report of the Director General* (Raporto de la Ĝenerala Direktoro) pri la laboro de UNESKO en 1957 (Esperanto menciita ekzemple sur pp. 38, 192, 227, 231).

5. *Records of the General Conference, Ninth Session, New Delhi* (Protokolo de la Ĝenerala Konferenco, Naŭa Sesio, New Delhi).

6. *UNESCO FEATURES n-ro 283/1958* kun mencio pri la Esperanto-tradukoj en *Index Translationum*.

7. *Dok E./C.2/INF. 5* kun listo de ĉiuj neregistaraj organizaĵoj en konsultaj rilatoj kun UNESKO.

8. *Dokumento 10 C/41* de la 30-a de junio 1958 aldono 102 (5 paĝoj) pri la kunlaboro de UEA kun UNESKO.

9. *UNESCO House News*, n-ro 17 de la 12-a de septembro 1958 publikigis sur la p. 11 informon pri la telegramo sendita de la U.K. en Mainz al UNESKO okaze de la 10-jara datreveno de la subskribo de la Universala Deklaracio. La titolo de tiu informo estas presita en Esperanto.

10. *Orient-Occident*, n-ro 4 de aŭgusto 1958 alportas informon pri la decido, ke la Unua Sekcio de la U.K. in Mainz pritraktu la grandan Projekton de UNESKO pri la Reciproka Aprecado de la Okcidenta kaj Orienta Kulturaj Valoroj.

11. *Monthly Bulletin on Scientific Documentation and Terminology* (Monata Bulteno pri Sciencaj Dokumentado kaj Terminologio) plurfoje publikigis informojn pri Esperanto kaj mallongajn tekstojn en Esperanto.

12. *Secretariat News* de U.N., Vol. 12, n-ro 16 de la 29-a de aŭgusto 1958 publikigis informon en Esperanto kaj en la angla pri filmprezentado en la U.N. filmklubo.

13. *UNESKO-afiŝoj* kun teksto en Esperanto. Okaze de la Dekjara Datreveno de la U.D. de la Homaj Rajtoj UNESKO presigis serion de fotoafiŝoj kun teksto en Esperanto. La serio konsistas el 12 belegaj fotoafiŝoj prezentantaj la diversajn Rajtojn de la Homo. Entute estas presitaj mil serioj, do konsiderinde pli ol la unuan fojon.

En ligo kun la diversaj konferencoj de neregistaraj

organizaĵoj en konsultaj rilatoj kun UNESKO la agado de UEA kaj la partopreno de ĝiaj reprezentantoj en la laboro estis plurfoje menciita.

MALLONGAJ INFORMOJ

Jarlibro de Internaciaj Organizaĵoj: La sepa eldono de tiu ĉi gravega verko, eldonata de Unio de Internaciaj Asocioj, por la jaro 1958/1959 donas informojn pri pluraj internaciaj Esperanto-organizaĵoj: UEA, E. Akademio, Skolta Ligo, TEJO, ISAE, Internacia Geografa Asocio, Internacia Asocio de Juristoj Esperantistoj, CED, SAT, ILEI, Universala Ligo.

Associations: Organo de la Unio de Internaciaj Asocioj daŭre enhavas informojn aŭ menciojn pri Esperanto, ekzemple en la n-ro 19/1958 sur la pp. 596, 604, 620; en la numero de oktobro sur la pp. 684 kaj 717.

Artikoloj Zamenhof-Jaro: CED turnis sin al pluraj kunlaborantoj kun la peto verki artikolojn okaze de la Zamenhof-Jaro. Ĝis la nuna momento 21 kunlaborantoj promesis liveri almenaŭ po unu artikolo ĝis la fino de januaro 1959. La artikoloj estos senditaj al diversaj landoj por traduko kaj publikigo en la naciaj lingvoj.

Donacoj por CED

Stato de la 5-a de oktobro 1958	126-11-11
N.N. en V. Nederlando	9- 5
P. Williams, Novzelando	5- 0
J. Futran, Usono	1-15- 5
S-ino R. Seddon, Britujo	2- 0- 0
Horace Jenkins, Usono	10- 0
La stato de la 24-a de nov. 1958	131-11- 9

Koran dankon al ĉiuj donacintoj.

Donacojn por CED oni povas sendi al la Centra Oficejo de UEA, Eendrachtsweg 7, Rotterdam, C. Nederlando; al Unuiĝo Esperantista Franca, 34, rue de Chabrol, Paris, 10, Francujo; al la ĉefdelegitoj aŭ perantoj de UEA aŭ al CED rekte je la nomo kaj adreso de ĝia direktoro, 77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.



LA JUNA VIVO

Cion por la redakcio de "L. J. V." sendu al:
Philippe Bonnard,
119 Avenue de Choisy, Paris 13, Francujo

STELO Korekto:

En la N-ro 635 de "Esperanto" aperis la adreso de la Sekretario de STELO. (Studenta Tutmonda Esperantista Ligo). La legantoj bonvolu legi Walton Rectory kaj ne Walten; kaj noti, ke estas preferinde skribi ne al lia hejma adreso, sed al "Trinity College" Cambridge, Britujo.

Perantoj de Stelo.

Britujo: J. C. Wells, Trinity College, Cambridge.

Francujo: Philippe Bonnard, 119 avenue de Choisy, Paris 13.

Italujo: Alfredo Maineri, Via Armando Diaz 1-3. Genova.

Jugoslavio: Mirjana Simić, Zagreb, Krajiska 4.

Nederlando: Johan Derks, Prof. Reinwardtlaan II, Utrecht.

Pollando: Pettyn Andrzej, Milano-wiek k/W-wy, ul. Kościuszki 2I.

Skandinavio: Sven Ziegler, Bjerne-devej 62, København Brh.

Banko:

Ĉar la Studenta Ligo ne adoptis rezolucion por starigi konton en sia nomo, kaj ĉar en Britujo ne estas poŝtĝirkontoj, la Sekretario-Kasisto starigis bankkonton en sia nomo: J. C. Wells — Stelo account — National Provincial Bank — Cambridge.

Oni ankaŭ povas uzi la Poŝtĉekkonton de La Esperantista Studento: 34, rue de Chabrol, No. 16 466 58 Paris.

Adresoj de Studentoj.

Malgraŭ la alvokoj de la Prezidanto de Stelo, tro multe da gestudentoj ĝis nun ne indikis sian ekziston. Ili bonvolu tuj anonci sin ĉe la Redaktoro de la Juna Vivo (kaj de La Esperantista Studento), por ke oni senprokraste povu komenci efikan laboron en la universitatoj! Celkonsciaj esperantistoj ne rajtas timeme silenti kaj gape atendi, ke iu eksterhoma potenco iel progresigos la Internacian Lingvon....

Dormantoj vekigu! La landaj asocioj povas ankaŭ kunhelpi je la kolektado de adresoj.

RASISMO

Minacas al blankaj sinjoroj insido kaj gluto en flamoj el faŭko, ĝis ili komprenas, ke homa kvalito ne havas rilaton al haŭto.

Poul Thorsen

**PAGU LA KOTIZON 1959!
VARBU JUNULMEMBROJN DE
UEA!**



S-ro Jean Thierry kaj Lic. Tibor Sekelj dum la konferenco de UNESKO en Parizo.

(daŭrigo de paĝo 8)

etendiĝo de aktivecoj al Azio kaj Afriko, kaj ĝi insiste petis la membrojn-ŝtatojn kaj ankaŭ la neregistarajn organizaĵojn kunlabori kun UNESKO en ĝia granda projekto pri reciproka aprezado de Orientaj kaj Okcidentaj Kulturoj.

Konsiderante ke la celoj de UEA en multaj aspektoj koincidas kun tiuj de UNESKO, ni laboras iel paralele kun tiu institucio. Ni jam entreprenis paŝojn por disvastigi nian agadon al la malpli

evoluintaj kontinentoj, kaj dum la Majenca kongreso kreis komisionon por la reciproka aprezado de la Orientaj kaj Okcidentaj kulturoj, kiu agos per propraj metodoj, tamen en akordo kun la ĝeneralaj principoj de UNESKO. Krom tio, dank' al la Internacia Lingvo, la gazetaro kiu staras je nia dispono ĉiam pli kaj pli efike kontribuas al la diskonigo de la celoj kaj atingoj de tiu institucio, en sektoroj malfacile atingeblaj per aliaj publikaĵoj.

Estas certe, ke nia pozicio ĉe UNESKO plifirmiĝas de jaro al jaro paralele kun la efektiva kontribuo de la Esperanto-Movado al la celoj de UNESKO. Kun la tempo la kreskanta aprezado tradukiĝos ne nur en materian helpon, sed ankaŭ en iompostioman adopton de la lingvo. Sed por atingi tion la respondecaj instancoj de niaj landaj asocioj, lokaj grupoj kaj aliaj organizaĵoj devas agi kiel eble plej unuece laŭ la decidoj kaj konsiloj de la kompetentaj organoj de UEA. Siavice, ĉiu unuopa esperantisto devas doni, en la kadro de tiuj planoj, la maksimumon de siaj kapabloj sur la plej diversaj agadkampoj, kiujn prezentas la Esperanto-Movado.

Tibor Sekelj

Belarta konkurso 1959

Laŭ promeso, ni anoncas la taskon difinitan por fako 5 de la Literatura Sekcio; nome, por la

Kongreslanda Branĉo

Ĉi-jare, la tasko havas iom alian formon ol en antaŭaj jaroj. Oni decidis nomi verkiston havantan gravan rilaton kun la kongresa urbo kaj peti konkursojn tradukitajn el liaj verkoj. La L.K.K. tial difinis la poeton varsovian

Leopold Staff

Staff naskiĝis en 1878. Liaj poemoj estas klasikaj laŭ formo kaj ĉefe esprimas spiritan trankvilon. Tamen ne mankas en liaj verkoj varieco de formo kaj kelka inklino lukti kun la eternaj misteroj. Liaj versvolumoj plej bone konataj estas: "Revoj pri potenco", "La ridetoj de la horoj", kaj "La trueto kudrila".

Por partopreni en la kongreslanda branĉo, oni do traduku el la poemoj de Leopold Staff; maksimume 108 versoj per 1 ĝis 3 poemoj. La premioj kaj la ĝeneralaj reguloj difinitaj en la novembra numero de ĉi tiu organo validas ankaŭ por la kongreslanda branĉo.

Pri la fako 4 (originala drameto)

Oni tiras la atenton de konkursemuloj sur la fakon menciitan. La nombro de drametoj ricevitaĵoj en la konkursoj de la lastaj jaroj indikas, ke niaj

verkistoj ne sufiĉe ĝin ŝatas. Eble oni hezitas, pripensante la malmultan ŝancon por prezentado de tiaj verkoj antaŭ publiko.

Tamen tiaj drametoj povas havi grandan utilecon diversflankan. La parkerigo de vigla, bonstila dialogo havas instruan valoron, kiun oni ne bezonas akcenti; ĝi liveras al la lernanto provizon da utilaj konversaciaj formoj, kaj tio per si mem plene motivigas la prezentadon de drametoj eĉ antaŭ la modesta laŭ nombro publiko de la ceteraj grupanoj.

Krome, ne senkaŭze oni difinis, ke originalaj drametoj por ĉi tiu konkurso rajtas esti "en formo de radia dialogo". Eĉ sen parkerigo, oni povas tiajn dialogojn prezenti el malantaŭa ekrano, per mikrofono el alia ĉambro; oni povas ilin surbendigi per magnetofono kaj reludi ilin por la propra profito, aŭ eĉ interŝanĝi la bendojn kamarade kun aliaj grupoj.

Sed por plene profiti el tiaj agadoj oni devas disponi pri inteligente verkitaĵoj drametoj kun dialogo en bona konversacia stilo. Verkistoj do ne malŝatu tiun formon literaturan; ĝi estas riĉa per eventuala utilo.

La premio „Comella-Bassols“

Oni memorigas pri tiu valora premio, proponita en konkurso por gaja rakonto en Esperanto. Plenaj detaloj por partopreno aperis en la septembra numero 1958 de ĉi tiu revuo.

Gerald C. Jervis, Sekretario

Kultura kooperativo de esperantistoj en Brazilo

I - Ĝia Fondiĝo

Ĉe la komenco de l' nuna jardeko aro da esperantistoj en Rio de Janeiro, Brazilo, alvenis al la konkludo, ke nia landa Esperanto-movado bezonas memstaran organizadon kun la celo disvastigi nian idealon per taŭgaj kaj trafaj rimedoj.

Fakte ne nur la esperantistaro sed ankaŭ la simpatiantoj en Brazilo tiel nombriĝis, ke pli ol unu fojon nia lando enskribiĝis unualoke en la UEA-konkursoj. Tio ŝuldiĝas al la seriozeco per kiu niaj antaŭuloj tie ĉi zorgadis pri la Zamenhofa idealo. Kaj tiu agmaniero fariĝis heredaĵo, kiun ni klopodas nepre konservi.

Tial niajn naciajn Esperanto-kongresojn helpas la aŭtoritatuloj kaj ni povas aserti, ke, en Brazilo, Esperanto ne havas malamikon, ĉu en la meza ĉu en la altranga klaso. Ĉiuj religioj, ĉiuj politikaj partioj kaj ĉiuj filozofiaj sistemoj ĝin apogas aŭ respektas.

Tamen fariĝis do necese plifirmigi la starponton de nia movado, en tia grado, ke ĝia libroservo, eldonfako kaj socia vivo respondu al la postuloj de la konstanta kreskado de niaj kunlaborantoj.

Sekve, en la jaro 1951, antaŭvidkapablaj esperantistoj komprenis, ke ni nur povos bone antaŭenpuŝi la aferon per la fondo de entrepreno kun forta ekonomia bazo. Kaj por tio oni decidis, ke la kooperativa movado estu la formo por atingi tiun celon. Jen aperis la Kultura Kooperativo de Esper-

antistoj, kies prezidanto ekde ĝia fondiĝo estas D-ro Braz Cosenza, italdevena brazilano, advokato, kontorsciencisto kaj tre entuziasma samideano tiam nur 5-jara esperantisto.

Ĉe sia fondiĝo la Kooperativo kalkulis nur pli-malpli 100 membrojn, kun la kvoto de po 5.000 kruzeroj. En tiu jaro (1951) oni eĉ dubis pri la ebleco de ĝia plano. Sed la postaj faktoj antaŭvidigis la venkon pro la helpo de preskaŭ la tuta brazila samideanaro. Nun ĝia membraro nombriĝas je ĉirkaŭ 800. Kaj ni esperas la baldaŭan aniĝon de pliaj 200, tiel ke en la Zamenhofa jaro ni esperas atingi la milion. Nun la kvoto de ĉiu membro varias de 5 mil ĝis 50 mil kruzeroj.

II - Ĝia Programo

Kvar punktojn entenas la programo de nia Kooperativo :

a) *Instalo de kiel eble plej ampleksa kaj proviza LIBREJO en propra ejo.* Oni decidis ĝin aĉeti en 1953, kiam ankoraŭ ne granda estis nia enspezo. Tamen en la jaro 1956 estis inaŭgurita tia sidejo en interetaĝo de granda konstruaĵo ĉe la centro de nia Brazila Ĉefurbo.

Ni fiere raportas, ke D-ro Ivo Lapenna, preterpasante Rion dum sia vojaĝo al Montevideo, honorigis nin per sia vizito al nia sidejo, tiam konstruata, kaj laŭdis nian iniciaton.

La ejo estis partpage aĉetita kaj finpagita per pli ol 1 miliono da kruzeroj.



La bildo montras la konstruaĵon ITU, (kun blanka strio), ĉe la centro de la brazila ĉefurbo, en kies interetaĝo funkcias la Librejo Esperanto, de Kultura Kooperativo de Esperantistoj.

Ĝia tuta librostoko nun enhavas ĉirkaŭ 20.000 ekzemplerojn en kaj pri Esperanto.

Ĉar la librejo mezuras pli ol 70 kvadratajn metrojn, oni ĝin utiligas ankaŭ por gvidado de Esperanto-kursoj kaj ioma socia Esperanto-vivo. Nun regule funkcias 6 elementaj kursoj krom 2 paroligaj kaj 1 speciala por infanoj.

Ĉiusabate vespere la samideanaro, gvidata de la virina fako, ekzercadas la kantadon de Esperantohimnoj kaj kanzonoj.

Po unu fojo ĉiumonate la virinfako (nun lerte kaj sindone estrata de F-ino Laŭra Rebelo de Carvalho) realigas festeton por kunfratiĝo de la samideanoj.

Rimarkindaj estas ankaŭ la ekskursoj efektivigataj de nia Kooperativo; la renkontiĝa loko estas nia librejo pro ĝia centra situo en la urbo.

b) *Starigo de taŭga kaj ampleksa PRESEJO por la eldono de verkoj en kaj pri Esperanto.* En la jaro 1955 je la 24-a de oktobro (koincide la Tago de la Unuiĝintaj Nacioj) la estraro de la Kooperativo ĉe notario subskribis la aĉetdokumenton por partpagado de 13 presmaŝinoj, inkluzive de intertajpa linotipo.

En nia presejo laboras nun 20 personoj sub la zorga administrado de nia sindona S-ano Joaquim dos Santos Gonçalves.

Ĝis nun nia Kooperativo jam eldonis lernolibrojn kaj literaturaĵojn (entute 8 verkojn) en ĉirkaŭ 45.000 ekzempleroj. Kaj notinda estas nia eldono de "Curso Prático de Esperanto", de Ferenc Szilágyi (20.000 ekzempleroj), ĝis nun la plej nombra eldonaĵo de Esperanta lernolibro ekster Eŭropo. Krom tio la Kooperativo jam eldonis pli ol 100.000 propagandilojn kaj flugfoliojn disdonatajn tra nia tuta lando.

Por la centjara datreveno de D-ro L. L. Zamenhof, la Kooperativo eldonos jenajn librojn :

1. "Gramática de Esperanto" (2-a eldono) de Ismael Gomes Braga;
2. "Norda Prismo", versoj de Sylla Chaves;
3. "Ellernu", de Ferenc Szilágyi;
4. "Dio Rekompencu vin", teatraĵo de fama brazila verkisto, Joracy Camargo, tradukaĵo de Silvío Peixoto;
5. "Esperanto-Parnaso", diversaj aŭtoroj (poeziaĵoj);
6. "Nia Kantaro", nacilingva folkloro tradukita esperanten;
7. "Tutmondaj Rakontoj", de pluraj aŭtoroj;
8. "Vida de Zamenhof" (Vivo de Zamenhof), de Edmond Privat, nacilingva tradukaĵo de F-ino Yolanda de Araújo Costa;
9. "Dicionário Esperanto-Português", de Ismael Gomes Braga;
Krom tiuj, se eble, ankaŭ :
10. "Lingua International" (La Internacia Lingvo), de D-ro Ivo Lapenna, nacilingva traduko de D-ro A. C. Bonfim;
11. "Vida das Plantas" (Vivo de la Plantoj), de Paul Neergaard, nacilingva tradukaĵo de Cedilha Neto; kaj
12. "La Estonteco de Ekzistas", de Enio Cardoso, el la nacia lingvo tradukita de Esperanta rondo de nia Kooperativo.

Kiel ligilo inter la anoj, la Kooperativo eldonas sian nacilingvan monatan oficialan bultenon "Kooperativismo", sed, en 1957, ĝi aperis en Esperanto kiel revuo en la monatoj Julio kaj Aŭgusto por omaĝi respektive nian sindoneman S-anon Ismael Gomes Braga kaj la 15-an Brazilan Kongreson de Esperanto, ambaŭ festantaj sian 50-jaran jubileon. Ĉar la eldono de nia revuo en Esperanto vekis grandan intereson ĉe la samideanaro, eĉ eksterlanda, la Kooperativo intencas publikigi en la proksima jaro revuon tute en Esperanto.

c) *Instalo de Hotelo-Restoracio por gastigi en-kaj eksterlandajn samideanojn.* Tiun punkton de la programo oni nur efektivigos post la finpago de la presejo, kio jam alproksimiĝas. Ĝi celas pli enspezigi por la funkciado de la tuta organizaĵo. En tiu hotelo oni deziras enkonduki esperantistan vivsacion, kiel ekzemple okazas en la Grésillon-a Kastelo en Francujo.

d) *Starigo de granda farmobieno proksime de Rio de Janeiro.* Punkto ankaŭ realigota. Ĝi same celas parte enspezigi por nia movado, sed ĝia ĉefa rolo estos la solidareca helpo al la maljuniĝintaj anoj de la Kooperativo, kiam ili ne plu povos perlabori sian vivon.

La skizo de tiu nia estonta entrepreno estas fari ĝin memproviza kaj sendependa, kun propra vivrimedo por aro da esperantistoj. Tial ĝi nepre devos enteni, ekzemple, plantejojn, loĝejaron, lernejon, kinon, hospitalon, apotekon, amuzejon, fine ĉion necesan al komplementa socia vivo esperantista. Estas intenco tien translokigi la presejon por ke ĝi tiam nur laboru por la Esperanto-movado, anstataŭ kiel nun, kiam ĝi ankoraŭ devas funkcii precipe por enspezado.

III - Ĝia Signifo

La nuna estraro de la Kooperativo estas jena : Prezidanto, D-ro Braz Cosenza; 1-a Sekretario, Prof. Othon Branco Baena; 2-a Sekretario, Prof. Aylton de Lima Rocha; Kasisto, D-ro Dilermando de Castro; Konsilantaro; Prof. Ismael Gomes Braga kaj D-ro Alberto da Cruz Bonfim; Kontrolantaro; Leŭtenanto-Kolonelo Naylo Jorge da Cunha, F-ino Alice Maia, S-ro Plácido Alves de Oliveira, D-ro Enio Cardoso, S-ro Francisco de Assis Tôrres kaj Prof. Alfred Karl Gregorius.

Tiu aro da sindonaj geesperantistoj konscie komprenas, ke nuntempe estas nekontraŭstareble, ke la mondo marŝas en la kontraŭa direkto de l'individueco. Do, kooperativismo estas levilo por ĉiu entrepreno, kiu celas la veran progreson.

Ni penas surmarŝi tiun vojon, malgraŭ konstantaj malfacilaĵoj, miskomprenoj, monkrizoj kaj antaŭjuĝoj konservativaj. Eĉ inter esperantistoj,

(Daŭrigo paĝo 16)

Eŭropa Lingvo - Kampanjo

Fine mi povas komuniki al la granda esperantista publiko la rezulton de la

Enketo inter la urbestroj

pri kiu en sia festparolado en Mainz nia Ĝenerala Sekretario d-ro Lapenna elokvente parolis. Tial ne estas necese tie-ĉi denove diri multon. Al ĉiuj, kiujn tiu agado precipe interesas, mi rekomendas denove legi la tekston de tiu parolado en la septembra numero de nia Internacia Revuo Esperanto.

Kun helpo de la libervolaj kunlaborantoj en la Eŭropa Lingvo-Kampanjo ĉefurbestro Stein sukcesis formi specialan *Komitaton de Eŭropaj Urbestroj kaj Magistratoj por Esploro pri Esperanto*. Al ĝi aliĝis 37 urboj el 11 landoj:

AŬSTRUJO: Eisenstadt, Graz, Klagenfurt, Knittelfeld, Wien, Wiener-Neustadt, Wörgl - **BELGUJO**: Corbesse - **BRITUJO**: Nottingham - **DANUJO**: Esbjerg - **FRANCUJO**: Dijon, Mulhouse, St. Hilaire - Petitville - **GERMANUJO**: Aachen, Dortmund, Köln, Mainz, Neustadt, Rüsselsheim - **GREKUJO**: Patras - **ITALUJO**: Alessandria, Bologna, Mondovi, Nogara, Torino, Varese, Verona, Vicoforte - **NEDERLANDO**: Arnhem, Den Haag - **NORVEGUJO**: Hamar, Mo i Ran, Trondheim, Sarpsborg - **SVEDUJO**: Gotenburg, Lund, Uppsala.

Por la Komitato niaj kunlaborantoj forsendis demandfoliojn al 2874 urboj en Aŭstrujo, Belgujo, Britujo, Danujo, Francujo, Germanujo, Grekujo, Irlando, Islando, Italujo, Luksemburgo, Monako, Nederlando, Norvegujo, Svisujo kaj Turkujo.

669 urbestroj, do 23%, respondis al jenaj demandoj:

Kontrolkomisiono de lernolibroj

UEA decidis elekti kiel kontrolkomisionon de lernolibroj s-rojn E. Malmgren (prez.), H. Bakker, S. Dragsted, R. Rakuša kaj V. Setälä.

Verkantoj de lernolibroj rajtas turni sin al tiu komisiono por ricevi konsilojn, rekomendojn kaj proponojn, kaj rajtas ankaŭ sendi al ĝi siajn manuskriptojn por kompetenta prijuĝo. La adreso de la komisiono estas: S-ro E. Malmgren, Heleneborgsgatan 6, Stockholm (Svedlando).

I

Ĉu vi opinias, ke la diverseco de la lingvoj en Eŭropo malhelpas la ekonomiajn kaj kulturajn rilatojn de la nacioj, kaj ke tial estas dezirinde interkonsenti pri komuna lingvo?	Jes	Ne	Sen respondo
	581	72	16

II

Ĉu vi opinias, ke la nacio, kies lingvon oni elektus, havus specialajn kulturajn kaj ekonomiajn avantaĝojn, kontraŭ kio protestus la aliaj nacioj?	Jes	Ne	Sen respondo
	517	123	29

III

Ĉu vi opinias, ke la internacia lingvo Esperanto — kiu pro ĝia facileco povas esti lernata en plej mallonga tempo kaj pro ĝia neŭtraleco ne ofendas la naciajn sentojn de kiu ajn popolo — povos doni taŭgan solvon al la lingvo-problemo?	Jes	Ne	Sen respondo
	545	95	29

IV

Ĉu vi konsentas, ke la Komitato de Urbestroj sub la prezido de ĉefurbestro Stein en Mainz faru la necesajn paŝojn ĉe la Eŭropa Konsilantaro aŭ ĉe aliaj eŭropaj institucioj resp. ĉe iliaj membroj-ŝtatoj kun la celo	Jes	Ne	Sen respondo
a) ke kompetenta komisiono objektive esploru la avantaĝojn, kiujn la Internacia Lingvo Esperanto prezentas por la solvo de la lingvo-problemo en Eŭropo	586	56	27
b) ke ĝia uzo por la internaciaj rilatoj fariĝu ĝenerale tiel, ke samtempe estu protektata la rolo de la lingvoj de tiuj nacioj, kies lingvoj ne estas vaste disvastigitaj?	83,3	12,9	3,8

Do resume kaj meznombro: % 83,3 12,9 3,8

En specialaj leteroj aŭ notoj multaj urbestroj salutis la kuraĝan entreprenon de la Komitato kaj esprimis la deziron, ke la Komitato sukcesu klopodante forigi la lingvajn barojn inter la eŭropaj nacioj.

La rezulto de la Enketo estas tre kuraĝiga. Komence de januaro ĉefurbestro Stein, d-ro Lapenna kaj d-ro Herrmann, la komisiito de UEA por la Eŭropa Lingvo-Kampanjo, konferencos en Mainz por pritrakti la paŝojn nun farendajn. La esperantista publiko estos ĝustatempe informata pri ili.

d-ro W. Herrmann

Varsovia kaj mi

En ĉiu el ni kaŝiĝas la aventurema spirito de Uliso, kiu sopiradas al novaj mondoj — promeso de foraj horizontoj. Tiu spirito en mi ekposedis mian volon: ĝi volis unu fojon pli spiri la Herkulajn kolonojn de la nekonato, esplori landojn, pri kiuj nur la onidiro rakontas.

Strangaj Herkulaj kolonoj! trans kiuj ne atendas vin danĝeraj maroj nek Esperidaj ĝardenoj, sed tute simple aliaj homoj, kiuj en aliaj kutimoj daŭrigas la saman vivon. Plej unue doganhomoj. Doganhomoj, kiel ĉiuj aliaj en la mondo, kiuj preferas ne viziti viajn valizojn por eviti diskutojn en fremdaj lingvoj.

Mi vivas en Pollando, same kiel vi vivas en Kopenhago, en Marseille, en Mainz, en Rotterdam kaj en mil aliaj urboj sur la vasta terĝlobo. Kaj mi ridetas. Mi ride-
tas pri la legendoj, kiujn oni rakontas pri tiu ĉi mondparto.

Kiu diferenco, mi demandas

min, ekzistas inter tiuj ĉi homoj, kiuj promenas sur Marszalkowska strato en Varsovio, kaj tiuj, kiuj samhore promenas sur Rembrandt Placo en Amsterdam? Neniu. Fundamente estas la samaj homoj, kun la samaj problemoj kaj la samaj alspiroj. Ili nur organizis sian socian vivon en alia maniero — eble pli bona, eble pli malbona, la estonto diros tion. Sed ankaŭ en tiu nova konstruo ili montris sian sincerecon, sian individuecon kaj tiun amon al libereco, kiu en la tuta mondo estas respektata simbolo de la pola nacio.

Eĉ la arkitekturo ne ŝanĝiĝis: el ruinoj kaj ŝtonamasoj la urbo renaskiĝis kun la sama fizionomio, kiun donis al ĝi la jarcentoj: gotiko, baroko, renesanco kaj klasikismo ornamas Palacojn kaj la preĝejojn, vere multajn, kie la popola pieco estas kortuŝa en sia granda humilo.

La pola personeco intense reliefigas en la Artoj kaj ĉefe en la

Teatro, kie la plej diversaj kaj modernaj tendencoj kaj plej aŭdacaj scenografioj konkuras en kreado de novaj artaj esprimoj, kiuj mirigas nin eksterlandanoj.

Sed, ĉu vere ni estas eksterlandanoj en Varsovio? Eble en kiu ajn alia lando, sed ne ĉi tie. Vi spertos — kiel mi spertas — ke ni alvenintoj el Okcidento aŭ Oriento, Nordo aŭ Sudo, sendiference estas nomataj de la poloj "karaj gastoj". Kaj gastamon ili montras en grandaj kaj malgrandaj faroj.

Mi volus diri al la virinoj en Varsovio vian kaj mian admiron, ĉar ili estas ĉarmaj, ŝikaj kaj elegantaj. Ili ne estas senvivaj pupoj, sed eternaj slavinoj, por kiuj la mondproblemoj — ho feliĉo! — restis la nuanco de la haŭtoŝminko kaj la ombro de la okulharoj.

Permesu, amikoj proksimaj kaj malproksimaj, personan konsilon. Sekvu la voĉon de via aventurema Uliso. Plu ne fidu je onidiroj kaj je supozoj, sed venu mem al Varsovio, vidu per viaj propraj okuloj, kaj konkludu laŭ viaj travivitaj spertoj.

G. C. Fighiera



LA KONGRESA KOMITATO DE LA ZAMENHOFA JARO

La bildo montras kunvenon de L.K.K. en Varsovio. Oni povas vidi, sidantaj ĉe la tablo de maldekstre dekstren: S-rojn PLESKACZYŃSKI, organizanto de ekskursoj, RUDNICKI, veterano, kasisto, FIGHIERA, Konstanta Kongresa Sekretario, RAJSKI, Prezidanto de L.K.K., Inĝ. FETHKE, Zamenhof-solenoj, MONKIEWICZ, vic-prezidanto. Staras de maldekstre dekstren: Inĝ. TYMINSKI, Universala Ekspozicio, LASKOWSKI, Radio-aferoj, S-ino ZŁOTOWSKA, artaj programoj, ZAWADA, sekretario, S. FETHKE, financaj aferoj, NOWIŃSKI, eldonadoj. Mankas en la foto Inĝ. L. ZAMENHOF, nepo de la kreinto de Esperanto, Prof. KOZŁOWSKI, vic-prezidanto, CZUBA, loĝiga servo. Mag. GREBECKI, kulturaj programoj, USPIENSKI, gazetara servo.

VOKAS VOĈ' DE VARSOVI': VENU ANKAŬ VI!



Ekspozicio en Vrŝac, Jugoslavio. Maldekstre de la busto sidas prezidanto de la societo s-ro Stojniĉ, pioniro de Esperanto en Jugoslavio.

Sukcesa ekspozicio en provinca loko

En negranda provinca loko Vrŝac, Jugoslavio, la loka societo kun sia agema prezidanto Stevan Stojniĉ, unu el la pioniroj de la movado en Jugoslavio, aranĝis en septembro ĉi jare sukcesan ekspozicion. Inter 1160 ekspoziciaĵoj, la vizitantoj vidis la esperantajn librojn, gazetojn, turistajn prospektojn, rezolucion de UNESKO, desegnaĵojn pri la reto de UEA-delegitoj, multajn fotojn kaj alian interesan materialon.

Dum la 8 unuaj tagoj la ekspozicion vizitis 790 personoj. Ĉiuj loĝantoj sciis pri la ekspozicio kaj komentariis ĝin. La societo en Vrŝac pruvis kiel sukcese oni povas labori ankaŭ en malgrandaj lokoj, nur se ekzistas bona volo kaj emo.

E. L.

Kultura kooperativo

(Daŭrigo de paĝo 13)

feliĉe nemultnombraj, ni ankoraŭ trovas tiujn, kiuj ĝis nun ne komprenas nian celon.

Tamen ni fidas pri nia sistemo, kaj la pruvo de nia honesta kaj korekta agado troviĝas en la fakto, ke nia entrepreno estas :

a) konsiderata de publika utileco per la Urba Leĝo no. 892/57, dank'al iniciato de la urbkonsilanto Prof. Anibal Espinheira, kiu eĉ jam prezidis unu el niaj jarfestoj;

b) subvenciata de la Ĉefurba Komunumo laŭ oficiala decido publikigita en la koncerna Oficiala Gazeto de 30-nov-57, paĝo 19-a, pro iniciato de la urbkonsilanto D-ro Izac Izeckson, kiu estis reelektita, ĉar li prezentis leĝoprojekton por enkonduko de Esperanto en elementajn lernejojn, kaj tial lian nomon, foton kaj faron ni publikigis en nia Bulteno, kio altiris liafavore amason da voĉdonoj de multaj esperantistoj kaj simpatiantoj; kaj

c) plene apogata de, inter aliaj gravaj brazilaj esperantistoj, ĉefe prof. Iŝmael Gomes Braga, la veterano de nia Movado, kiu, en Brazilo, nun plej laboras por Esperanto; li estas konsilanto de nia Kooperativo kaj preskaŭ ĉiutage vizitas nian sidejon kaj nin tre helpas per siaj saĝaj kaj spertoplenaj konsiloj; eĉ en la plej malfacilaj momentoj de nia entrepreno, al ni ne mankis liaj kuraĝigaj vortoj kaj senkondiĉa solidareco.

A. C. Bonfim,
Konsilanto de la Kooperativo
kaj Fakdelegito de UEA por Gazetaro

La Internaciaj Konkursoj 1958

Stato je la 30-a de novembro

Konkurso I

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Jugoslavio	3800	5690	149.73
2.	Brazilo	7011	8225	117.31
3.	Pollando	6150	6505	105.77
4.	Germanujo	6865	6951	101.25
5.	Italujo	4030	3965	98.39
6.	Svedujo	6945	6420	92.44
7.	Francujo	7647	7066	92.40
8.	Nederlando	5567	5119	91.95
9.	Britujo	6963	6093	87.51
10.	Usono	3225	2730	84.65
11.	Danlando	2743	2278	83.05
12.	Hispanujo	2508	1999	79.70
13.	Svislando	2185	1730	79.18
14.	Belgujo	1907	1472	77.19
15.	Norvegujo	2144	1616	75.37
16.	Finnlando	2765	1935	69.98

Konkurso II

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Portugalujo	560	615	109.82
2.	Izraelo	240	255	106.25
3.	Aŭstralio	1228	1280	104.23
4.	Kanado	440	435	98.86
5.	Novzelando	955	878	91.94
6.	Sudafriko	235	215	91.49
7.	Aŭstrujo	1505	1360	90.37
8.	Japanujo	1280	1150	89.84
9.	Islando	315	270	85.71
10.	Maroko	659	457	69.35
11.	Urugvajo	414	275	66.43
12.	Argentino	1005	615	61.19

RADIO

Ciujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

En la tabelo horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon.

Mallongigoj: I = Informoj, P = Parolado, K = Kurso.

Ĉiutage	9.00-9.30	Rio de Janeiro, 30.78m, 25.48m. K.I., L.B.V., Av. Rio Branco 43-3°-Rio de Janeiro (D.F.) Brazilo.
Dimanĉo	14.00-14.15	Piraĉununga, 198m. (1520 kcs). K. Rádio-Difusora ZYI 3, Piraĉununga (Sao Paulo), Brazilo.
	19.00-19.25	Sofia, 49.42m, 39.11m. P. Radio Sofia, Bulgarujo.
	22.30-22.55	Sofia, 39.11 m, 30.93m, P.
	23.35-23.55	Bilbao, 265m. (1133 kcs). P. Radio Bilbao, Hispanujo. (Horo variebla dum unuhora diverslingva programo.)
Lundo	00 45-01.00	Juiz de Fora, 60.91m. I.P. Rádio Industrial, Rua Batista de Oliveira, 745, Juiz de Fora (Minas Gerais), Brazilo.
	17.30-17.35	Bern, 48.66m, 31.46m, 16.87m. P. (D-ro Baur.) SRG., Kurzwelldienst, Neuengasse 23, Bern, Svislando.
	18.10-18.30	Valencia, 233m. (1285 kcs). P. La Voz de Levante, Valencia, Hispanujo.
	22.40-22.57	Hilversum, 298m. (1007 kcs). P. N.C.R.V., Schuttersweg 8, Hilversum, Nederlando (nur la unuan lundon de ĉiu monato).
Mardo	02.00-02.30	Caracas, 476 m. (630 kcs), 48.62 m. P. Radiodifusora Nacional, Caracas (Venezuelo).
	11.55-12.00	Bern, 48.66m, 31.46m, 13.94m, P. (D-ro Baur).
	16.40-16.50	Wien. 513m. (584 kcs), 293m., (1025 kcs), 48m., 41m., 30m., 25m., 16m., 11m. I. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV, Aŭstrujo.
	17.55-18.10	Roma. 50.34m., 41.24m., 30.90m. P. Radio Roma, Casella Postale 320, Roma, Italujo.
	19.00-19.15	Stockholm, 32.30m., 26.20m., 20.20m. P. (nur la lastan mardon de ĉiu monato). Radio I.B.R.A., Poŝtako 821, Stockholm I, Svedujo.
Merkredo	17.55-18.10	Roma. Kiel marde.
	22.50-23.00	Hilversum, 402m. (746 kcs), I, V.A.R.A., Heuvellaan 33, Hilversum.
Ĵaŭdo	08.30-08.40	Paris. 280m. (1070 kcs), 235m. (1277 kcs). K. Esperanto-Office, Orléans (Loiret), Francujo.
	11.55-12.00	Bern. Kiel marde P. (D-ro Privat.)
	23.05-23.20	Zagreb, 264m. (1135 kcs). P. Radio-Zagreb, Jugoslavujo.
	23.30-24.00	Sao Paulo, 62.83m. I.K. Rádio Progresso, Sao Paulo, Brazilo.
Vendredo	17.30-17.35	Bern, Kiel lunde. P. (D-ro Privat.)
	17.55-18.10	Roma. Kiel marde.
	21.30-21.45	Guatemala Cd. 470m., 197m., 47m., 30.50m. I. Radio-Esperanto, La Voz de Guatemala. Mez-Ameriko.
Sabato	18.30-19.00	Rio de Janeiro, 375m. (800 kcs), 25.10m. K.I. Radio Ministério da Educação, Praça da República 141A, Rio de Janeiro (D.F.), Brazilo.
	21.00-21.20	Rio de Janeiro, 214m. (1400 kcs). K. Radio Roquete Pinto PRD5, Rio de Janeiro, Brazilo.
	22.15-22.22	Hilversum, 298m. (1007 kcs). P. K.R.O., Emmastraat 52, Nederlando.

Radio Roma. 2-I, Louis Braille, okaze de la 150-a datreveno de lia naskiĝo; 6-I, Tra la literaturo; 9-I, Leterkesto kaj bibliografio; 13-I, Novaĵoj el Italujo; 16-I, Itala verkisto Alessandro Manzoni; 20-I, Italiaj kanzonoj en Esperanto; 23-I, Mortinta urbo Herculano; 27-I, Universala geniulo Leonardo da Vinci; 30-I, Itala belarta urbo Bergamo. Krome, ĉiun merkredon, kuriero de Esperanto.

Radio Zagreb. 1-I, Radio-humoraĵo; 8-I, Recenzoj pri novaj libroj; 15-I, Pri la jugoslava filmo; 22-I, Piratoj sur la Adriatika maro; 29-I, Primovadaĵaj novaĵoj kaj respondoj al la korespondantoj.

Tra la Mondo

● **Aŭstrujo** sub la radoj de la Montanunio" estas la titolo de gazet-artikolo, kiu pritraktas la malhelpojn, kiuj renkontas praktike la organizaĵo pro la ĵaluzo kaj egoismo de la partoprenantaj ŝtatoj. Precipe interesa estas jena observaĵo: "La aspirado esti informita kiel eble plej precize kaj pri ĉio movadas nature tunojn da demandiloj, statistikoj kaj raportoj. Ĉiuj — membroj ja estas Belgujo, Francujo, Germanujo, Italujo, Nederlando kaj Luksemburgo — devas esti tradukataj en la koncernajn lingvojn kaj krome anglan. Ĉi tio havigis al la organizaĵo la moknomon: Eŭropana komunajo por karbo, ŝtalo kaj papero!" Por si mem parolas la citaĵo.



● **Francujo.** "Hieraŭ kaj hodiaŭ Japanio" estis ekspozicio en Angers, Francujo, la 16-an - 26-an de oktobro. Organizita de la loka Esp. - a grupo kunlabore kun japanaj espistoj kaj oficialaj servoj kaj konforme al la nuna agado de UNESKO pri "reciproka aprezo de la kulturaj valoroj inter okcidento kaj oriento" ĝi estis vizitata de preskaŭ 2000 personoj. Filmoj estis senhalte projekciataj, la juna japana ĵurnalisto Josiko Kajino unu tagon prezentis "japanan vesperon", la lokaj ĵurnaloj kaj radio raportis, kaj UNESKO estis post la fino informita per letero kaj ĵurnaleltondaĵoj. Sukcesa kaj gratulinda iniciato.

● **Germana Demokrata Respubliko (Orienta Germanujo).** Esperanto-kurso en la oficiala instruplano de la popolaltlernejo de Quedlinburg (GDR) funkcias post persista laboro de la instruistoj Joh. Haupt kaj Alois Jauernig. Ekspozicio estis aranĝita kaj dum tiu aliĝis 23 personoj. Post kelkaj lecionoj la nombro pliiĝis al 38 kaj ĝi eble ankoraŭ kreskos.

● **Venezuelo.** Ĉiumarde je la horo 2.00 GMT "Radiodifusora Nacional" en Caracas, Venezuelo, elsendas duonhoran programon en Esperanto. La ondolongoj estas 630 kaj 6170 kc. Depost la 3-a de novembro la elsendo funkcias.



44-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Varsovio — Pollando

1.-8. aŭgusto 1959

JUBILEA ZAMENHOFA JARO

HONORA KOMITATO HONORA PROTEKTANTO

JOZEF CYRANKIEWICZ, Prezidanto
de Ministroj de la Pola Popola
Respubliko

Membroj :

Czesław Wycech, Marŝalo de la Pola
Parlamento;

Stanisław Kulczyński, prof. Prezi-
danto de la Pola Demokratia Partio
kaj de la Tutpollanda Paca Komitato;
Tadeusz Kotarbiński, prof. Prezidan-
to de la Pola Akademio de Sciencoj;

Władysław Bienkowski, Ministro de
Klerigado;

Tadeusz Galinski, Ministro de Kul-
turo kaj Artoj;

Stefan Żolkiewski, Ministro de
Superaj Lernejoj;

Zygmunt Dworakowski, Prezidanto
de la Cefurba Konsilantaro en Var-
sovio;

Stanisław Turcki, prof. Rektoro de la
Varsovia Universitato.

Adreso :

44-a Universala Kongreso de Esper-
anto, Varsovio.

Telegramoj :

Esperanto-Kongreso, Warszawa;

Banko :

Narodowy Bank Polski, Warszawa,
VII O.M. nr. 1531-9-525.

OFICIALA KOMUNIKO

Suplemento al n-ro 2 Novembro 1958

Tuttagaj ekskursoj :

La tuttagaj tri kongresaj ekskursoj
vizitos :

- 1) Bjalistok, naskiĝurbo de D-ro
Zamenhof, okaze de enmasonigo de
fundamenta ŝtono al starigota
monumento al la kreinto de la
Internacia Lingvo;
- 2) Zelazowa Wola, kie naskiĝis la
granda komponisto Chopin, kun
virtuozita koncerto dediĉita al la
Kongresanoj;
- 3) Lowicz, tra princaj kasteloj Arca-
dia kaj Nieborow, kun prezento de
folkloraj kantoj kaj dancoj en
popolkostumoj.

Postkongresa ekskurso :

La kvartaga postkongresa ekskurso
celos Krakovon, unu el la plej antikvaj
mezepokstilaj urboj de Pollando, kun
dumvoja vizito al Ĉenstoŝova, la fama
sanktejo de la "nigra Madono".

Gazetara servo :

La Kongresa Gazetara Servo komen-
cis sian laboron por informadi la polan
kaj eksterlandan gazetaron, kinon,
radion kaj televidon pri la Universala
Kongreso.

Katolika kunveno :

Dum la Universala Kongreso la pola
sekcio de Internacia Katolika Unuiĝo
Esperantista festos la tridekan dat-
revenon de sia ekzisto.

Internacia Junular-kunveno :

Sub la aŭspicioj de la 44-a Univer-
sala Kongreso de Esperanto, de la 24-a
ĝis la 31-a de julio 1959 okazos en
Gdansk (Danzigo) la 15-a Internacia
Junular-Kunveno de TEJO.

Poŝtmarkoj :

La pola Ministerio por Poŝto decidis
eldoni en 1959 poŝtmarkon honore al la
centjara datreveno de la naskiĝo de
D-ro L. L. Zamenhof.

MONATA KOMUNIKO

N-ro 3

Decembro 1958

Glumarkoj :

La Loka Kongreso Komitato alvokas
la esperantistojn tra la tuta mondo
vaste aĉeti la kvarkoloran jubilean
kongresan glumarkon. Ĝi estas men-
debla je prezo de 0,25 us. dolaroj por
folio de 25 markoj ĉe la Landaj Asocioj
aŭ ĉe: 44-a Universala Kongreso,
Varsovio.

Postkongreso :

La Loka Kongresa Komitato elektis
Krakovon kiel postkongresan urbon
(9-12 aŭgusto 1959). La postkongresa
ekskurso okazos kunlige kun la post-
kongreso.

Junula vespero :

La Loka Kongresa Komitato decidis,
ke dum la Universala Kongreso okazu
Junula Vespero dediĉita al la esperan-
tista junularo.

Junular-kunveno :

La 15-a Internacia Junularkunveno
en Gdansk (Danzigo) anoncas jenan
provizoran programon: Interamikiĝa
vespero, solena inaŭguro, diservoj en
Esperanto, vizitado tuttaga de Triurboj
(aŭtobusekskurso tra la regiono), jaht-
ekskurso, kulturaj prelegoj, oratora
konkurso, folkloraj kaj dancvesperoj,
laborkunidoj de TEJO, renkontiĝo
kun loka neesperantista junularo,

solena fermo, forveturo de partopren-
antoj al 44-a Universala Kongreso en
Varsovio.

Blindul-kongreso :

La 29-a Internacia Kongreso de
Blindaj Esperantistoj okazos de la 1-a
ĝis la 8-a de aŭgusto 1959 en la kadro
de la Universala Kongreso.

Kunveno de M.E.M. :

Mondpaca Esperanto-Movado anon-
cas sian Kongreson en la kadro de la
Universala Kongreso.

Biologia Jaro :

Parto de la prelegoj de Internacia
Somera Universitato, kiuj okazos en
Varsovio, estos dediĉitaj al temoj en
la kadro de la Internacia Biologia
Jaro, kiu estos festata en 1959 en la
tuta sciencista mondo, honore al la
150-a naskiĝdato de Darwin.

Afiŝo :

La Stata Turisma Komitato en
Pollando eldonis grandan nigre-blan-
kan afiŝon pri Varsovio, cm. 70 × 100,
kun dukolora teksto en Esperanto. La
afiŝo estas ricevebla ĉe la Landaj
Asocioj aŭ, en landoj kie ne ekzistas
Landa Asocio, de: 44-a Universala
Kongreso de Esperantistoj, Varsovio.

Statistiko :

Arabujo 1, Argentino 1, Aŭstralio 2,
Aŭstrujo 6, Belgujo 9, Brazilo 3, Bri-
tujo 24, Bulgarujo 5, Danlando 16,
Etiopio 1, Finnlando 3, Francujo 41,
Germanujo 40, Hispanujo 5, Islando 2,
Italujo 26, Japanujo 1, Jugoslavio 24,
Kanado 1, Maroko 1, Meksiko 1,
Monako 5, Nederlando 6, Norvegujo 3,
Novzelando 1, Pollando 137, Sovetunio
2, Svedujo 27, Svisujo 8, Sudafriko 1,
Urugvajo 1, Usono 3.

Entute 407 el 32 landoj. (Pasintjare
316 el 25 landoj).

REKORDA ALIĜADO EN VARSOVIO

Ĝis fino de novembro aliĝis al la
44-a Universala Kongreso de Esperanto
en Varsovio multe pli da kongresanoj
ol en antaŭaj Kongresoj je la sama
dato. La fenomeno klare reliefigas en
la subaj statistikoj, bonaŭguraj de
granda sukceso :

Ĝis fino de novembro aliĝis

Jaro	1955	1956	1957	1958	1959
Urbo Bolog.					
Kopenh.					
Mars.					
Mainz					
Vars.					
Kongr.	213	288	248	316	407

Dum novembro aliĝis :

En Bologna :	43
En Kopenhago :	56
En Marseille :	62
En Mainz :	36
En Varsovio :	95

G. C. Fighiera,
Konstanta Kongresa Sekretario

Agi ĉe internaciaj kongresoj

La plej kompetenta organo pri problemoj de internaciaj asocioj estas "Associations Internationales", gazeto de la Unuiĝo de la Internaciaj Organizaĵoj, kun sidejo en Bruxelles. Tiu gazeto estas samtempe la plej informita pri internaciaj kongresoj kaj renkontiĝoj, pri kiuj ĝi periode aperigas tre valorajn studojn kaj analizojn.

Laŭ "Associations Internationales" la unua kongreslando en la mondo estas Francujo. Sekvas, tre proksime, Svisujo kaj - trialoke, sed ankoraŭ kun negranda diferenco - Germanujo, al kiu - kvare - sekvas Italujo. Usono okupas la kvinan lokon. Fine, venas Britujo, en kiu la nombro da kongresoj aŭ renkontiĝoj estas proksimume la duono de tiu en Francujo, Svisujo aŭ Germanujo.

Grandan respondecon, do, havas la esperantistaj Landaj Asocioj de la supremencitaj landoj kaj tiuj de la tuj sekvantaj kongreslandoj, Aŭstrujo kaj Nederlando. Laŭ mia scio, ĉiu Landa Asocio regule ricevas de UEA informon pri la internaciaj kongresoj kaj renkontiĝoj okazantaj en ties teritorioj en sekvantaj monatoj. Multaj Landaj Asocioj reagis kun bona organiziteco kaj regule atentigas la kongresanojn pri la de ili spertitaj lingvaj malfacilaĵoj, pere de la seslingva faldfolio tiucele eldonita de U.E.A. Speciale menciinda estas la Informa Oficejo de Itala Esperanto-Federacio, kiu havas propran konstantan komisiiton, kiu prizorgas la kampanjon "Internaciaj Kongresoj". (Multaj estas la konstantaj kampanjoj de la nomita Inform-Oficejo: filmoj, turismaj prospektoj, prelegvojaĝoj, gazetara servo, k.t.p.)

Kompreneble, per metodo de obstina agado ĉe samaj medioj oni povas atendi duspekajn rezultojn: tujajn kaj postajn. Tio signifas, ke samtempe oni certigas la "ĉeeston" de la Internacia Lingvo en la Kongresoj kaj maturigas potenciajn esperantistojn. Ne estas tro malprudente esperi, ke per vasta semado ni atingos eminentajn reprezentantojn de la internacia kultura vivo, kelkaj el kiuj povus esti frapitaj de niaj tezoj kaj sekve portos al nia batalo plejkonvinkan kontribuon.

La tuta afero estas tiel grava, ke mi surpriziĝis legante en la oktobra numero de "Esperanto" noton de Komitatano Stöp-Bowitz pri rifuzo de iu Landa Asocio disdoni en scienca Kongreso, en kiu li partoprenis, la seslingvan faldfolion. Tiu rifuzo, mi estas certa, ne reprezentas malapogon al komuna agado sur internacia kampo de nia Movado, sed nur provizoran nesufiĉe konsideritan sintenon, kiun pli saĝa pripenso kaj sento de esperantista solidareco ŝanĝos en venonta tempo.

La demando koncernas ĉiujn Landajn kaj Fakajn Organizaĵojn, kiuj devus certigi ne tempaltempan, sed konstantan, zorge planitan kontakton kun la internaciaj kongresoj, kie la lingvo-baroj plej firme pledas por la uzo de komuna lingvo.

G. C. Fighiera

NEKROLOGO

● La 21-an de oktobro mortis s-ro C. Graversen, Danujo, en sia 73-a jaro. S-ro Graversen esperantiĝis 52-jara, sed tre baldaŭ li fariĝis eminenta esperantisto. Li estas konata kiel la plej bona tradukisto en Danujo, precipe pro siaj tradukoj de ses libroj de Martinus.

J. O. Nyström

La 18.4.58 foriris veterano de la Esperanto-movado, s-ro J. O. Nyström, Nässjö, pli ol 84-jara. Dum multaj jaroj li estis ano de UEA kaj aktive partoprenis la Esperanto-movadon dum pli ol 40 jaroj. Interalie li estis prezidanto de la loka klubo, gvidis kursojn kaj havis vastan korespondadon, kiu parte estis grava, ĉar dum unua mondmilito li estis peranto inter belgaj militkaptitoj kaj iliaj familioj. Li ripozu en paco!

G. N.

BINDITAJ JARKOLEKTOJ 1958

enhavantaj "BELARTO"-n
Prezo por membroj: 6,50 gld., 26 st.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

EENDRACHTSWEG 7 ROTTERDAM C. NEDERLANDO

OFICIALA INFORMILO

La 1-an de decembro 1958

N-ro 311

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la fino de novembro kaj ankaŭ por komparo je la fino de novembro 1957:

	1957	1958
Asociaj membroj	18951	19600
Individuaj membroj		
MJ	819	765
MA	5530	4882
MS	678	532
Pat.	5	5
DM	307	307
HM	52	47
JMJ	15	18
JMA	100	120
	<u>7506</u>	<u>6676</u>
	26457	26276

DELEGITOJ

Alĝerio

Oued-Athménia (Constantine) D: S-ro René Lavallée, juĝa interpretisto.

Argentino

Villa Revol (Cordoba) FD (modaj revuoj): S-ro Jozefo Matilla, vendisto, strato 4.

Britujo

Huddersfield (Yorkshire) D: S-ro Benjamin Brearley Beaumont, ŝtatoficisto, 5, Central Close, Fartown.

Weston-s-Mare (Somerset) VD: vakas.

Bulgarujo

Sofia C. FD (elektraj fervojoj): S-ro Simeon Simeonov, elektroingeniero, Gavril Genov 22.

Ĉilio

Santiago D: S-ro Ramón Fernández, meblisto, Str. Santa Rosa 574I.

FD: (filatelo): la D.

FD: (astronomio): S-ro Igor Collona Valevski, ŝtatoficisto, Str. Rancagua 023.

Danlando

Esbjerg (Jutlando) VD: vakas.

Francujo

Aix en Provence (Bouches du Rhône) D: S-ro Marcel Jullien, profesoro, "La Lagramuso", Avenue Henri Pontier.

FD (juro): S-ro Henri Malinvaud, notario, 15 Rue du 4 septembre.

Germanujo

Euskirchen (Rheinland) D: S-ro Richard Wenzel, vitrogravuristo, Erftbleiche 7.

Hispanujo

Madrid D: S-ro Ángel Figuerola, profesoro, strato Costa Rica, 20, bajo, A FD (oficistaj aferoj): S-ro Florencio Enfedaque, oficisto, San Bernardo. 35.

FD (turismo): S-ro Manuel Martín, poŝtisto ĉe turismooficejo, strato Francisco Silvela 60.

La literatura revuo

sub ĉefredaktoreco de
Prof. G. Waringhien
laborado de la plej famaj verkistoj
aperas ĉiun duan monaton
32/40 paĝa - - poŝformato jare fr. fr. 400.- aŭ
egalvaloro

Ricevas la abonojn :

En Francujo : R. Fiquet, Poŝta korto 2259-98
Marseille

Alilande : Ĉiuj Ĉefdelegitoj kaj landaj Perantoj
de UEA

PETU SENPAGAN SPECIMENON

Redakcio: 7. Av. Léon-Gourault 5. Bd. Stalingrad
Choisy-le Roi (Seine) Nice (A-M)
Francujo. Administracio:

Via menuo en Esperanto !

Aperis

GASTRONOMIA TERMINARO

de Erhard Urban

en lingvoj esperanta, angla, ĉeĥa, franca. 128 p.

Prezo : 3,25 gld, 13 steloj

MENDU TUJ ĈE U.E.A.

DU MALSANOJ EN ESPERANTO

de H. A. de Hoog

Interesa libro por ĉiuj lingvistoj

La restanta stoko transiris al U.E.A.

Kvanto limigita

Prezo : 2,90 gld. 11,60 steloj

Mendu ĝin ĉe U.E.A.

BELARTO

unika kajero pri :

LITERATURO

PENTRARTO

MUZIKO

LINGVISTIKO

Prezo : 2,75 gld. (11 steloj) por membroj

3,25 gld. (13 steloj) por nemembroj

72 p.

Mendu ĝin tuj ĉe U.E.A.

ANGLA ANTOLOGIO

1000-1800

Unika verko pri grava literaturo

Redaktis : William Auld kaj Reto Rossetti

Eldona Fako de U.E.A.

Prezo : 10.- gld.; 40.- steloj

Mendu ĉe U.E.A.

Okaze de la Zamenhof-jaro:

FOTO DE ZAMENHOF.

poŝtkarto 0,20 gld.; 0,80 steloj

GRAVURBILDO DE ZAMENHOF.

21 × 27 cm de Reto Rossetti, (vidu
Dec. no. 1958) tre taŭga por klubejoj,
kunvenejoj ktp. 0,75 gld.; 3 steloj

BIOGRAFIAJ INFORMOJ

PRI D-RO L. L. ZAMENHOF

de R. Jossinet 1 resp. kup., 1,20 steloj
Ĉion liveras la C.O. de U.E.A.

ARTA JUBILEA GLUMARKO

Komune uzota de ĉiuj Esperanto-
organizaĵoj en la mondo. Vendota je
kostprezo : 4.- gld. (16 steloj) por 1000
ekz. plus sendkostoj.

Aperos baldaŭ. Mendoj jam akceptataj
ĉe U.E.A.

12 FOTO-AFIŜOJ DE U.N.E.S.C.O.

kun Esperanto-teksto

memorige al la Deklaracio pri la Homaj Rajtoj

Eldonis U.N.E.S.C.O.

Sendas U.E.A. kontraŭ 4 resp. kup. aŭ 5 steloj.

RETORIKO

kun aparta konsidero al esperanta parolarto

de

IVO LAPENNA

Dua Eldono reviziita kaj kompletigita

Eldono de la aŭtoro

Prezo : 11.- gld. bindita

44.- steloj

9.- gld. broŝurita

36.- steloj

Mendu ĉe U.E.A.

aŭ ĉe la aŭtoro



Dezirinda posedaĵo por ĉiu esperantisto.

Presita en Nederlando ĉe Zwagers, Rotterdam